



*Pli nobla ras' iatempe elvenos,  
Al la homara espero plenum';  
El la anim' libereco elstamos,  
En la okuloj sciada la lum'.*

*Gento kun gento, kaj lando kun lando  
Vivos kunule sen unu ribel';  
Ciu kun ĉi uj parencoj fariĝos—  
Filej liberaj de l' Patr' en ĉiel'.*

## MOTIVOJ POR LA FORIGO DE FORTIKIGITAJ LANDLIMOJ LA GRANDA EKZEMPLO DE KANADO KAJ LA UNUIĞINTAJ ŜATOJ.

### Kial Tiuj Landlimoj?

Jen estas du tre rimarkindaj diraĵoj, unu de LORD BRYCE kaj la alia de S-RO NICHOLAS MURRAY BUTLER, Prezidanto de la granda Kolumbia Universitato en la Unuiğintaj Ŝatoj. Ili montras, kiel senbezonaj estas fortikajoj kaj landlimoj ĉe tiuj nacioj, kiuj volas interpacigadi. Tiuj, kiuj ne volas esti pacemaj, ĉiam trovos metodojn kaj motivojn por malpaco.

### La Longa, Nevidebla Linio.

PREZIDANTO MURRAY BUTLER diras en antaŭparolo al libro verkita de Prof. Dunning (G. Allen & Unwin) pri la interrilatoj de la Brita Imperio kaj la Unuiğintaj Ŝatoj dum la cent jaroj de paco inter tiuj landoj, post la Interkonsento de Gento:

"La longa nevidebla linio, kiu apartigas la Unuiğintaj Ŝatojn kaj la Dominionon de Kanado, de longe restis negardita, malgraŭ la fakteto, ke du energioj, rapide pligrandigantaj popoloj daŭre puŝis okcidenten sur ambaŭ ĝiaj flankoj. Tiu ĉi longa, nevidebla, negardita linio estas la plej konvinkiga atesto, kiun la mondo povas prezenti pri la ebleco de modernaj memregantaj popoloj interpacigadi. Gi prezentas ekzemplon, kiun oni esperas, kun tute racia espero, povas iam esti universale sekvata."

### Okazintajo sen Paralelo.

LIA MOŠTO VICGRAFO BRYCE, O.M., en la sama verko, parolante pri tiu mirinda nevidebla linio inter la Unuiğintaj Ŝatoj kaj Kanado, diras:

"Ciu jardo de la landlumo por preskaŭ 4,000 mejloj estas fiksita de sciencaj termezuristoj. Eviti aŭ amike prikonsenti ĉiujn disputeblajn punktojn, kiuj povus troviĝi laŭlonge de tiu ĉi linio, multe pli longe ol ĉi alia landlumo inter civilizitaj nacioj, estas per si mem okazintajo sen paralelo en la historio.... Ili donis la pli belan ekzemoniam viditan en historio pri nedefendita landlumo, rilate al kiu la du popoloj reciproke fidis unu al la alia, ke ĝi ne kreos militiſipan armilaron."

La forigo de fortikigitaj landlimoj inter la diversaj landoj estas unu el la ĉefaj celoj de la movado de la Civitanoj de l'Mondo, la nova Asocio de pacamantoj pri kiu la legantoj de tiu ĉi gazeto jam atentigis. La beja ekzemplo de Kanado kaj la Unuiğintaj Ŝatoj emfazigas la valoron de tiu ĉi movado, kiu laboras por la efektivigo de la espero de Prezidanto Butler, ke ĝi "povas iam esti universale sekvata." Ciu, kiu deziras studi tiun ĉi gravan problemon, aŭ kiu estas preta por labori, eĉ en ĉi tiu malluma nokto de milito, por la alvenigo de la tago, kiam la principoj de la paco regos sur la tutmondo, estas invitata peti, sur la suba formulo, *senpagan* ekzempleron de la broŝuro de la CIVITANOJ DE L' MONDO pri KIEL CESIGI MILITON POR ĈIAM.

**AL LA CIVITANOJ DE LA MONDO,  
PITLOCHRY, SKOTLANDO.**

Bonvolu send al mi *senpagan* ekzempleron de via broŝuro pri KIEL ĈESIGI MILITON.

Nomo .....

Adreso .....

### ALVOKO AL ĈIUJ INTERESATAJ PRI LA VENONTA GENERACIO.

La problemoj, kiujn la nuna Milito elstarigis, estas multmultaj. La Hodiaŭaj Civitanoj devas trakti pri multaj el ili, sed pli multaj devas esti pritraktataj de la Morgaŭaj Civitanoj. Ĉiu, kiuj havas tiun ĉi pli largan vidpunkton pri la Milito kaj ĝiaj efikoj devas interesigi gejunulojn pri nova fako de la movado de la Civitanoj de l' Mondo.

Tiu ĉi fakon oni nun organizas por instrui gejunulojn per korespondado pri la faktoj pri la kaŭzoj de milito kaj la rimedoj por forigi militarmon.

*La movado de la Civitanoj de l' mondo ne celas monprofiton, sed por pagi la koston de afranko kaj presado, nominala kotizo, unu ŝilingo (duonmoso), estas postulata por aligo al la Korespondenda Lernejo.*

**AL LA CIVITANOJ DE L' MONDO,  
PITLOCHRY, SKOTLANDO.**

Mi deziras fariĝi membro de via Korespondenda Lernejo. Mi enmetas unu ŝilingon (duonmoson), kotizojn, pro kiu mi rajtas ricevi (1) vian brosuron; (2) mian ateston pri Mond-Civitaneco; kaj (3) iun alian eldonojon, kiuju vi eldonos, tute *senpage*.

Nomo .....

Adreso .....

## THE BRITISH ESPERANTIST

RUGBY.—Moat Hotel, Regent-st., Tues., 7.30.  
SCOTTISH LEAGUE OF CATHOLIC ESPERANTISTS.—Miss M. H. CORCORAN, 9, Bellevue-st., Edinburgh.—Thur., 8.30.  
SHEFFIELD.—Mrs. WALLER, 58, Acher-nd., Millhouses.—Builders' Exchange, Cross Burgess-st., Fri., 8 p.m.  
SHEFFIELD Y.M.C.A.—W. HAGEN, Glengarth, Handsworth.  
SHIPLEY.—Miss M. SCHOFIELD, 7, Hope View.—Co-operative Hall, Westgate, Fri., 7.30.  
SOHAM (CAMBS).—G. F. FENTON, Soham (Cambs.).  
SOMERCOTES ALFRETON.—FRANK WARD, George-st. Riddings, nr. Alfreton.—Primitive Chapel, Leabrooks, Thur., 7.  
SOUTHPORT.—Mrs. PIERPOINT, Ainsdale.—561, Lord-st., Mon., 8.  
SPEN VALLEY.—ERNEST BENTLEY, 6, Old Robin, Cleckheaton.—Museum, Leeds-nd., Millbridge, Wed.  
ST. ANDREWS.—Miss N. REID, 64, Market-st.—Tues., 8.  
ST. HELENS (LANCS).—Miss F. DAVIES, 60, Claughton-st.—Central Chambers, 2, Market-st., Wed., 8.  
STOCKTON-ON-TEES.—T. R. WILSON, 6, Dovecot-st.—Lit. and Phil. Institute, Mon., 7.30.

STOKE-UPON-TRENT.—Miss A. VIGGARS, Hope Cottage, Silverdale, Staffs.—Church Inst., Thur., 8.  
SUNDERLAND.—W. COWLEY, 6, Norfolk-st.—I.L.P. Rooms, Blandford-st., Thur., 7.30.  
"NIA RONDETO."—Rev. W. A. TODD, 15, Gillside-grove, Roker.  
SYDNEY (Zamenhofa Klubo).—Miss A. LUSBY, 223, Stanmore-nd., Stanmore.—80, Bathurst-st., First Thur., 8 p.m.  
TODMORDEN.—H. CROWTHER, 8, Oak Mount.—Wild's Temperance Hotel, 1st and 3rd Wed. in month, 7.30.  
TUNBRIDGE WELLS.—J. A. GILL, Lower Green-nd., Rusthall.  
WARRINGTON.—Miss D. E. PARSONAGE, 14, Bewsey-nd.—27, Bewsey-st., Wed., 8.  
WELLINGTON, NEW ZEALAND.—Miss M. OCKENDEN, Esperanto Hall, 156, Lambton Quay, Tues., 8.  
WESTERN AUSTRALIA ESP. SOCY.—Miss M. WATSON, Stott & Co.'s College, St. George's terrace, Perth.  
WIGAN.—F. BURGESS, 28, Charles-st.—Marsden's Café, 31, Market-st., Fri., 7.30.  
WISBECH.—Miss E. MILLER, Wistaria Ho.—The Institute, Tues., 8.

## ★ THE ESPERANTO Blend of Purest SCOTCH WHISKY.

54/- per  
doz.

Or 5s. per bottle. To Esperantists,  
£2 6s. per doz.

Carriage paid.

Terms: Cash with Order.

Payments may be made by Cheque on the Čekbanko Esperantista.

KORESPONDU ESPERANTE PREFERE.

BUCHANAN, SCOTT & CO.,  
Garthland Street, GLASGOW.

Jus aperis.

## LIA LASTA ŠANCO (His Last Legs).

Komedio en du aktoj de W. B. BERNARD.

El la angla lingvo tradukis **GEGO**.

Prezo afrankite, 8½p.

B.E.A., 17, HART STREET, W.C.

## Gregg Shorthand

### The BEST for ALL Languages

Gregg, the BEST Shorthand for ALL Languages, is marvellously easy to learn, because of the simplicity of its basic principles. It has but few rules, and these are presented in such simple language that they may be readily comprehended by even young Students.

All of the characters are light; no shading is required. This gives to Gregg Shorthand freedom in movement.

Position writing is avoided; that is, every character is written on the line of writing—or the line may be dispensed with altogether.

The sounds of the words are written in their natural order, and each essential sound is expressed by a definite sign. This makes the reading as sure as the reading of longhand.

Can be learned in one-quarter of the time necessary for the older method. This is a great advantage to the student whose time for study is limited, because it allows more time for the study of other subjects.

Write for Booklet E, and we will send copy of our Magazine free. First Text-Book, Sixpence.

THE GREGG PUBLISHING COMPANY,  
21, Harrington Street, Liverpool.

Jus eldonita.

## NOVA SENTO FILOZOZIA ROMANO.

De TAGULO.

150 Paġoj. 1s. 3d. Afrankite. 0·625 Spesmilo.

British Esperanto Association.



Jam gajnis 300 Grands Prix, Orajn Medalojn, k.t.p. Fabrikistoj, laŭ specialaj sigelitaj patentoj de privilegio, al L.M.M. la Reĝo de Anglujo, S.M.M. la Reĝino, S.P.M. Reĝino Alexandra; ankaŭ al la Popolo jam de preskaŭ 200 jaroj.

Now Ready.

## The "EDINBURGH" ESPERANTO POCKET DICTIONARY.

Leather, 2/1 post free. Cloth, 1/1 post free.

Published by T. NELSON & SONS,  
London, Edinburgh, Paris, and New York.

May be ordered from all Booksellers and from  
**BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.)**,  
17, HART STREET, LONDON, W.C.

Jus Aperis.

## LA VENECIA KOMERCISTO.

La Dramo

## The MERCHANT OF VENICE

DE  
SHAKESPEARE.

Tradukis

**ALFRED E. WACKRILL**

(Membro de la Akademio Esperantista).

Prezo: 1s. 7½p. Tole bindita 2s 2p. afrankite

BRITISH ESPERANTO ASSOC., 17, HART STREET, W.C.

## AN ORIGINAL NOVEL

By H. A. LUYKEN, F.B.E.A.

## MIRINDA AMO.

Rekomencita de la Akademio.

295 pp. Well Printed on Good Paper.

Art Paper Cover, 2/6 net; Blue Cloth Boards, 3/6 net.  
Postage 3d. extra.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated).

PURA KAKAO, kia estas tiu de FRY, konsistas sole el bonaĵo: ĝi estas emulsi prenota en formo fluideca, samtempe trinkaĵo kaj nutraĵo, tute malsama je infuzajo el folioj aŭ beroj.

## Sapo "Espero."

La ĉiutaga sin lavado estas necesa operacio por la bonsano. Sed ne estas sufiĉe uzi sapon. Oni devas uzi bonan sapon, sapon kiu samtempe purigas kaj sanigas la haŭton.

Jen kial la Sapo "Espero" estas speciale taŭga por Esperantistoj:—

Gi estas enpakita triope en bela arta skatoleto esperante presita.

Gi estas verdkolora kaj havas bonegan parfumon.

Gi ne kostas pli, ol ordinara sapo.

Gi purigas kaj sanigas la haŭton, kaj laste

Ĉiuj profitoj estas dediĉataj al la Esperanto Movado.

	Prezoj afrankite en la Britaj Insuloj.	Sm.
1 skatolo (tri pecoj)	... 11d.	0.458
2 " " "	... 1s. 8d.	0.833
3 " " "	... 2s. 5d.	1.208
4 " " "	... 3s. 2d.	1.583
6 " " "	... 4s. 6d.	2.250

Ĉiuj mendoj devas esti antaŭpagitaj prefere per ĉekoj aŭ transpagiloj de la Ĉekbanko Esperantista.

*Speciala Noto por Grupsekretarioj:*—Grupoj povos fari profiton per la pograndaj aĉetoj kaj pomalgrandaj disvendadoj de skatoloj inter siaj membroj.

Aĉetebla el Uoago ĉe la  
**B.E.A., 17, Hart Street, London, W.C.**

Al kiuj oni devas sin turni por sciigo pri pograndaj aranĝoj.

## DUA ELDONO

## Esperanto-English Dictionary

(Vortaro Esperanto-Angla),

VERKITA DE

**EDWARD A. MILLIDGE.**

496-paĝa volumo, fortike tole-bindita.

**Prezo 5s. ; afrankite 5s. 3d.**

Ĉe Brita Esperantista Asocio. 17, Hart Street, London, W.C.

# The BRITISH ESPERANTIST.

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

VOL XI. N-RO 131.

NOVEMBRO, 1915.

PREZO 3 PENCOJ.

**KOSTO DE ABONO.**—En *Granda Britujo*, afrankite: por unu jaro, 3 ŝilingoj; unu numero, 3 pencojo.

*Eksterlande*, afrankite: por unu jaro, \$0.75, fr.4, M.3; laŭ internacia mono, Sm. 1.50.

Abonoj estas akceptataj ĉe la komencigo de ĉiu monato, kaj devas esti pagataj per poštmandato aŭ Ĉebanka transpagilo. Sin turni al la Sekretario, 17, Hart-street, London, W.C.

**REDAKCIO.**—Manuskriptojn, k.t.p., oni volu sendi al la Redaktora Komitato, 17, Hart-street, London, W.C. Tradukantoj antaŭ ol sendi siajn verkojn volu ĉiam certigi, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la originalaj eldonintoj permesas la represigon.

Pri artikoloj la Komitato rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p. Ordinare oni ne resendas artikolojn neakceptitajn.

**ANONCOJ.**—Pri anoncoj, sin turni al la Direkcio, THE BRITISH ESPERANTIST, 17, Hart-street, W.C.—Privataj anoncoj pri Esperantistaj naskiĝoj kaj edziĝoj estas enpresataj po 2 ŝilingoj por kvar linioj.

## ENHAVO.

	PAGO.
Esperanto and the War .. .. ..	197
Chronicle—Coming Events .. .. ..	198
British Esperantists serving in the Army, Navy, or Red Cross .. .. .. ..	201
Libraro kaj Gazetaro .. .. .. ..	202
Pri D-ro Zamenhof .. .. .. ..	201, 203
La Senkompara Bienulino. A. BERGMANN, trad. P. BLAISE .. .. .. ..	204
La Konkurso. Originale verkis "TAGULO" ..	205
Estas neeble Forgesi! S-ino KIROV, trad. D-ro ANDREO FIŠER .. .. .. ..	209
Kio estas la Lingvo de Pensado. E. L. JACKSON	210
Bela Edziĝpropono. Trad. FRANK O. ZOCHER ..	211
B.E.A. New Members, Examinations, Council Meeting, Guarantors, F.K.I. .. .. .. ..	212

## Esperanto and the War.

The Glasgow Esperanto Society opened their winter session in the Royal Philosophical Society Rooms, on 4th October, 1915, when Colonel John Pollen, C.I.E., LL.D., London, lectured on "Esperanto and the War." He said the terrible disease of war, from which mankind is suffering, is due to the poison of misunderstanding, and the true antidote is knowledge and sympathy. War is the outcome of evil feeling, which we must fight against; as Tennyson says, "Down with ambition, avarice, pride, jealousy; down with the evil eye and the evil ear, for each is at war with mankind."

In the midst of the present hostilities Esperanto has introduced an element of understanding and concord. He related cases where a knowledge of Esperanto was of great advantage to prisoners in mitigating their hardships, and obtaining for them better conditions. It has also been helpful in connection with wounded and interned soldiers. Esperanto is being learned in internment camps; in one camp in Holland there are 130, who have formed a group with the motto "Hope, peace, progress." The triumph of Esperanto has been further shown in its use for inquiries regarding missing soldiers. The Universal Esperanto Association,

with headquarters in Switzerland, received the names of 200 soldiers whom the military authorities were unable to trace, and whose families had given them up for lost. Out of the first 30 names six have been found.

He advised the members to maintain their interest in Esperanto, so that during the time of war they might prepare for peace. Our ally, Russia, has evoked our admiration as never before, and arrangements are being made in different cities to further the learning of the Russian language. Esperantists rejoice at all such efforts, for "the gift of a new language is the gift of a new soul." They welcome and encourage the learning of other languages, but they desire that Esperanto should be the first language used after our own, because of the valuable mental training it affords, and also on account of its usefulness as a means of international communication.

Esperanto is very much easier to learn than any national language. He knew one man who took five years to learn Russian merely moderately well, although an expert in other European languages, and in Indian languages also, whereas the same man learned Esperanto thoroughly in as many months. Everyone con-

templating learning Russian, or any other language, he advised to begin with Esperanto, and make it the key to the others. That is the advice also that authorities such as the late Professor Mayor, of Cambridge, gave. A large number of Russians already use Esperanto, so it is easy for Esperantists to find correspondents in that country. In India, too—where the lecturer spent many years of official life—there are a large number of Esperantists, although the need for a neutral language is not felt there so acutely as in Europe, because they have Hindustani, an auxiliary language, founded on roots common to the different dialects.

Esperanto is formed in a similar manner; it is not created out of something that never existed before. Its vocabulary consists of carefully selected root words common to the majority of existing languages; and its construction is regulated in a perfectly easy and logical manner. It is the work of the genius and judgment of Dr. Zamenhof, of Warsaw, a great linguist, who gave it to the world freely. So unobtrusive is this great benefactor that the world is scarcely aware of his existence, but

those who know his work love and honour him for his magnanimous character no less than for his genius.

Esperanto is of importance in commercial matters. The war has given us new ideas as to international relationships. Our interests are now indissolubly bound up with those of our nine allies. It is not at all likely that these allies will ever learn each other's languages, so a common means of intercommunication is desirable, and Esperanto provides that means. If the people of each country will learn Esperanto—a simple, easy, neutral language—then the language barrier between the different nations will be removed.

Esperantists are certain that in furthering the use of this auxiliary language for all purposes of international communication they are helping to bring about a condition of knowledge that will enable the people of the different countries to communicate with each other more readily, and such free intercommunication will make for greater progress in all departments of life.

R.G.B.

## CHRONICLE.

*Matter for the Chronicle should be sent to the Editor not later than the 15th of the month, for insertion in the following number. Reports may be in English. Matter for "Coming Events" (which should be as concise as possible) may be sent in up till the 20th. Secretaries, please note Address: 17, Hart-street, London, W.C.*

### COMING EVENTS.

**Esperanta Diservo** okazos dimancon, Nov. 14an, je 3.15, en *Harcourt Church, St. Paul's-road, Canonbury, London, N.*, kiam predikos Pastro J. A. Beard, kaj kantos S-ino Jessy Kent Parsons.

**Mildmay.**—Malgau la mallumaj stratoj kaj aliaj malhelpoj, ĉi tiu grupo en la lasta tempo multe kreskis, kaj altiris tiom da novaj anoj kaj vizitantoj, ke oni komencis du novajn kursojn—elementan kaj superan—sub la gvido de S-roj C. P. THOMPSON kaj M. C. BUTLER respektive. La kursoj okazas de la 8a—9a horo, poste ĉiuj kuniĝas por la programitaj arangoj.

**Saturday, November 13th.**—Esperantists' visit to the Natural History Museum, South Kensington.

Official party meets in Main Entrance Hall at 2 p.m.

All Esperantists and friends heartily welcome.

Organiser—Mr. C. H. EDMONDS, 73, *Sydney-road, Hornsey, W.C.*

**La Federacio de Lancashire kaj Cheshire.**—La 31-a kvaronjara konferenco okazos sabaton, la 6-an de Novembro, en la Co-operative Assembly Rooms, Northgate, Blackburn, je la 3.15 p.t.m. Poste oni temangos en la samaj ĉambroj kaj dancado, k.t.p. sekvos. Partoprenontoj bonvole tuj sciigu S-ron H. Flint, 36, *Clifton-street, Blackburn*.

**London Club.**—Coming events at St. Bride's Institute, Ludgate Circus, E.C., 7 p.m.—9.30 p.m. :—

Nov. 12.—Saradoj.

„ 19.—Parolado: "En Malines kaj la ĉirkaŭajoj dum la Milito." D-ro VAN DER BIEST.

„ 26.—Ciu rakontu pri rimarkinda Esperanta memorajo.

Dec. 3.—Parolado, kun lumbaldoj: "La Belga Congo." S-ro PAUL BLAISE.

Visitors are cordially welcome to attend the above meetings.

### GENERAL.

**La Facileco de Esperanto.**—S-ro J. APPLEBAUM, el Liverpool, skribas:—

En Januaro mil naŭcent dek kvin mi sendis *Esperanto, or All*, al Profesoro A. W. Warrington, Chengtu, W. China, kies nomon mi vidas hodiau en la B.E. kiel kandidato por la aneco de la B.E.A.

La 28an de Marto, du tagojn post kiam la profesoro ricevis mian libron, li skribis al mi la jenan leteron en Esperanto:—

"Vian leteron mi ĝoje ricevis en la dudek-sesa tago de Marto. Pardonu al mi malkorektojn miajn, ĉar mi havas sole la esperanto libron, kiun vi sendis al mi. Hodiau matene mi lasis mian liton, kaj antaŭ matenmango komencis lerni Esperanton. Manĝinte mi legis Esperanton kaj leteron mi skribis.

"Meztago poste (posttagmeze) mi sidis en mia seĝo kaj mi estis portata de tri homoj al la urba ĝardeno, tie mi trinkis teon kaj legis la *Esperanto for All*."

Alia letero datumita kvin tagojn poste, alvenis Liverpoolon unu semajnon poste. Jen la enhavo:—

"La Esperantolibro, kiun vi sendis al mi, estas legitade mi. Mi skribas al vi por montri al vi, kiom mi estas progresinta.

"En Hinujo oni vivas nun same kiel oni vivis, kiam la Mastro promenis sur la tero. Jaŭdon, la unuan tagon de Aprilo, Sinjoro Lu-kwang-tajo invititis min kun ĉirkau kvardek gastoj, tagmanĝi en hina preĝejo, kiu estas ekster la urbo.

"Tiu ĉi preĝejo staras apud unu foiro, kiu okazas unufoje jare. Tiam la vojo estas tre plena de homoj. La almozuloj, vestitaj per ĉifonoj streĉigas sur la vojon kaj montras siajn vundojn kaj ulcerojn kaj kriadas.

"Hinaj preĝejoj estas ne sole lokoj, kie oni pregas, sed ankaŭ promenas, ludas kaj manĝas. Ili ofte estas trebelegaj, kaj libertempe oni, kun siaj amikoj, iras al ili.

"Tiu ĉi, kie ni mangis, estis konstruita por honori la filojn kaj filinojn, kiuj estis mortintaj por sia patrujo. La pregejo enhavas portretojn de ili.

"Al ĉiuj de mia seĝportisto mi donis, pro tagpago, cent kvardek ĉasojn, kiu egalas du kaj duonan penceon. Jaŭdon mi donis al ili sescent 'ĉasojn' por temono. Tial ili portis min tre rapide hejmen."

Estas interese vidi, kiel rapida estas la progreso de Esperanto por komencanto, se li nur volas doni al ĝi iom da tempo, kaj kiel necese estas la konstanta frapado ĉe la pordo de ĉiuj konatuloj per la sendajoj de propagandiloj akompanataj per *Esperanto for All*.

Unu monaton poste li skribas al mi, ke li telegrafis al sia filo en Peking por Esperanta literaturaĵo, kiun li bedaŭrinde ne povis ricevi. Li nun havas elegantan suficecon, kaj mi ricevas de la Profesoro tre interesajn leterojn, ĉefe pri la vivo en Hinujo kaj pri la Marsa mitologio, kiun mi havas la intencion komunikti al la Esperantistaro, kiam la okazo sin prezentos.

**An Appeal from an Esperantist Interned in Austria.**—The following letter has been received from an Esperantist interned in Austria. Those wishing to help can obtain his name and address on application to the Secretary, B.E.A., who will also supply full instructions for sending parcels to Austria. It should be noted that tins may not be sent:—

September 16th, 1915.

DEAR SIR,

*Having had the honour of belonging as a Fellow to the British Esperanto Association for several years, I take the liberty of asking my samideanoj a favour, the granting of which would extremely oblige me.*

*Since the beginning of the War I have been interned in Austria, and have now entirely exhausted my resources. Having no relations to apply to, my captivity presses rather hard upon me, in spite of the generous help afforded by the American Consul. Would some of my samideanoj be so kind as to come to my assistance by sending me now and then a parcel of provisions? Such a kindness would be deeply appreciated.*

*I am the only Esperantist among the 68 British prisoners here, so you could perhaps send some propaganda books also.*

*Hoping you will kindly excuse my troubling you,*

#### LONDON.

**Balham, S.W.**—Dank' al la klopodoj de S-ro Blaise, helpata de S-ro E. Goodale, kurso de Esperanto okazas ĉiumerkrede de la 7.20 ĝis 9.50 en Elmfield-road, L.C.C. lernejo (proksime de la stacidomo).

Ceestas 8 pli-malpli nove varbitaj studentoj, 3 anoj de la loka Esperanta Klubo kaj 4 sindonaj gesamideanoj, kiuj aliĝis por ebligi la daŭradon de la kurso—tial ke la minimuma nombro estas 15.

La unua parto de la vespero estas dediĉita al la klarigado de la gramatiko, kaj la dua al konversacio. Sinjorino Blaise estas la instruisto (libro uzata: *The Esperanto Manual*).

Lokaj samideanoj sendu interesatojn al la kurso kaj gin subtenu, precipe pro la fakto, ke la estro de la lernejo, S-ro Thew, estas tute favora al nia afero.

La kursanoj deziras publike danki lin pro lia afableco kaj helpemeco rilate al la starigo de la kurso.

**Central Y.M.C.A.**—In accordance with a proposition made by a Belgian "samideano," the direction of the Y.M.C.A.'s French section authorised the opening of a trial course of Esperanto.

Though very little advertising had been done, fifteen persons inscribed, and the course began in the first days of August.

Amongst the students were Belgian, French, English, Italian, and Russian gentlemen.

The course has now come to an end. Encouraged by the success of this trial, the teacher has resolved to give a winter course if the number of students is sufficient.

This course will be given in about 15 lessons, every Thursday evening, from 8 p.m. to 10 p.m., for gentlemen only, at the Y.M.C.A. French Section, Tottenham Court-road, the first lesson taking place on Thursday, 4th November.

Given in French, it will specially be useful to Belgian, French, and Swiss people. Those who are interested should send their address at once to M. P. COCKS, 26, Carysfort-road, London, N. Inscription fee, 1s.

**Hammersmith.**—Mr. Alfred Bridges, as enthusiastically as ever, has just commenced, for the fourth year, his class in Esperanto at Hampshire House, Hog-lane, King-street. We wish him every success. Those interested should write to him at 187, Blythe-road.

**Haverstock Hill, N.W.**—La kursoj anoncitas lastan monaton (instruistoj S.-ino Blaise kaj S-ro Butler) ne okazas pro la neklarigebla malfavoro de la lernejestro, kiu malpermesis ilian starigon kvankam 19 lernantoj sin prezentis (anstataŭ la oficiala minimumo 15). La donita preteksto estas, ke ne sufice da studentoj aliĝis dum la enregistriĝa semajno.

Kun granda bedaŭro ni devas sciigi la morton la 12 de Oktobro de F.-ino CARRIE THOMSON, anino de la Londona Klubo, konata al multaj kongresrintoj pro ŝia delikata intelekto kaj ĉarmo. Longe si estis la kara kolegino de F.-ino E. A. Lawrence en la Redakcio de *The Review of Reviews*, al kiu ŝia morto estas granda perdo. Al ŝia patrino kaj parenco ni respektas esprimas plej korajn kondolencojn.

#### PUBLIKAJ KURSOJ EN LONDONO.

**Balham, S.W.**, Elmfield Road L.C.C. School (near Balham Station). Wednesdays, 7.20. Fee, 5s. Instructress, Mrs. BLAISE.

**Dalston, N.**—Esperantaj kursoj okazas ĉiun mardon kaj vendredon en la L.C.C. Vespere Instituto, Queen's-road, kie kunvenas kontentiga nombro da lernantoj. Instruisto, M. C. BUTLER.

**Greenwich, S.E.**, Halstow Road (Woolwich Road) L.C.C. School (near Tunnel Avenue and Westcombe Park Station). Wednesdays, 8 p.m. Fee, 2s. Instructor, E. A. ALLSOP.

**Penge, S.E.**—Kursoj okazas en Penge Evening Institute, Oakfield-road (kontraŭ Stacidomo Anerley); la elementa lunde, kaj la supera merkrede. Novaj anoj estos bonvenigitaj. Instruisto, M. C. BUTLER.

**Wood Green, N.**, Higher Grade Schools, Bounds Green Road.—Mondays, 8. Fee, 2s. 6d. Instructor, ROBERT ROBERTSON.

#### THE PROVINCES.

**Brighton and Hove.**—The Eleventh Annual General Meeting of the above group was held in the Club Room on Tuesday, October 5, at 7.30 p.m., when there was a fair attendance of members and friends. An innovation had been introduced, as intending members had been invited to be present as visitors, so that they might know how the business of the club was carried on. This was found to be quite a success. There was not much change in the election of officers, except that Mr. J. G. Sims was elected auditor and two more members were elected to committee. The financial position of the club was found to be good, and the membership and attendance had been well maintained. It had been found impossible to hold any public propaganda meetings on account of the unsettled state of the times and the public rooms having been taken over as hospitals for the Indian wounded.

The ordinary weekly meetings were resumed on October 12th, to which gesamideanoj will always be heartily welcomed.

**Burnley.**—Esperanto ankoraŭ iras bone ĉi tie. S-ro W. B. Currie instruis kurson dum la somero, kaj jam du kursoj komencigis por la vintro.

**Dunstable.**—The group has commenced its meetings again for the Winter Session, devoting the first hour to elementary, and the second to more advanced and conversational, Esperanto. During the summer the more enthusiastic members kept in touch with Esperanto by an occasional evening ramble across the fields, etc.

**Gateshead.**—La vintra sezono de ĉi tiu grupo komencigis je la 2-a de Oktobro, kiam kontentiga nombro da anoj ĉeestis. Je la fino de la leciono por la komencantoj S-ro W. B. Hall donacis, je la nomo de la grupo, ekzempleron de la "Edinburga Vortaro" al S-ro Geo. Watson, kiu bone laboris dum kelkaj jaroj kiel grupsekretario kaj kiu nuntempe pro manko de tempo ne povas daŭrigi la devojn apartenantajn al tiu ofico. Nia bona amiko, S-ro Satchell, el Londono, faris interesan paroladon kaj esprimis sian plezuron ĉeesti la kunvenon.

Spite la nunaj cirkonstancoj, kelke da novaj anoj aligis kaj oni atendas sukcesplenan sezonon.

**Gloucester.**—It is hoped very shortly to start a class for the teaching of Esperanto in the Technical Schools here. Interest has lately been stimulated by letters from enthusiasts and their opponents in the local press. Those interested should apply to the secretary of the group, Mr. K. L. POWELL, 62, Conduit-street.

**Keighley (Yorks).**—The annual meeting of this society was held in the Municipal Institute on October 18th, Mr. Joseph Rhodes presiding. Mr. F. C. Rhodes (secretary), in presenting the thirteenth annual report, said that the War had brought with it many changes, and in the presence of this almost world-conflict some might think that the Esperanto Society would be driven out of existence. There had been, however, a larger class of students than usual during last winter. Further, the War was causing many to see that people of different tongues needed some common and neutral channel for conveying their thoughts and feelings to each other, and there was no doubt that after the War such means of communication would be resorted to in larger measure than ever. People were beginning to realise that now, as never before, Esperanto was an instrument of real utility. They therefore looked forward hopefully to the time when peace would once more reign, and when Esperanto would take its rightful place as a neutral language for the service of all the nations, and form one of the links in the chain that would bind the peoples of the world into a common fellowship. They were again carrying on their winter session under the Board of Education and the County Council at the Technical Institute, and a class had just been formed at the Haworth Evening Schools under the County Council, Mr. F. C. Rhodes having undertaken to conduct the class, which already numbered nineteen students. Two more of the Keighley blind were taking up the study of Esperanto. The financial position of the society remained good. The society have guaranteed £10 towards the fund now being raised in support of the British Esperanto Congress at York next year.

The report was adopted, and the following officers were elected:—Hon. president, Dr. Zamenhof; acting president, Mr. Joseph Rhodes; vice-presidents, the Mayor and Mr. T. P. Watson; hon. secretary, Mr. F. C. Rhodes; hon. assistant secretary, Miss Green.

**Rochdale.**—On September 28 Mr. Lewis, of Manchester, gave a lecture on Esperanto to the members and friends of the Rochdale Pioneers' Society. Mr. J. L. Roberts presided. There was a fairly large attendance. Mr. Lewis amused his audience by telling them he would make them able to read Esperanto at the end of

half an hour, and he was quite as good as his word. He pointed out the easy method of word-building by the use of prefixes and suffixes, and wrote several sentences on the blackboard, which he asked the non-Esperantists to translate, which they did without any difficulty. There was some discussion, and Mr. Lewis was heartily thanked.

**Swansea.**—Largely owing to the efforts of our enthusiastic *samideanino*, Mdme. Sužadinof, a group for the study of the language has been formed at the Institution for the Blind in Northampton-place here. It is proposed to affiliate to the B.E.A.

**Warrington.**—This society has sustained an irreparable loss by the removal of its esteemed president, the Rev. R. B. Primavesi, O.S.B., to Liverpool.

The present society was founded by Father Primavesi in 1910, and it is owing to his untiring zeal and enthusiasm that the group has attained its present flourishing state. Warrington's loss will be Liverpool's gain, for Father Primavesi has endeared himself to all Esperantists in and around Warrington.

**York.**—La ĉi tiea societo jus komencis la vintran sezonon. Ce la ĉiusemajnaj kunvenoj okazas lecionoj laŭ tri gradoj, ankaŭ duonhora tutsocia interparolado. La lastan dounhoron okazas diversaj antaŭarangitaj diskutoj, deklamoj, k.t.p. Oni arangis kelkajn koncertojn kaj ankaŭ debatojn pri "Deviga kontraŭ memvola militservado," kaj "Ĉu la ĉapeloj de virinoj estas abomenaĵoj?"

La anaro plimultigas semajnon post semajno, kaj ni forte esperas ke, antaŭ ol okazos la Naŭa Kongreso, la nombro almenaŭ duobligos.

Pri la Kongreso la tuta anaro fervorigas, kaj ĉiuj faros sian eblon sukcesigi la entreprenemon de la junia societo. Bonvole atentu la leteron presitan en la Oktobra numero de B.E. petante donacojn kaj garantumojn por la Kongreso.

**Sekretario.**—W. F. Lawrence, 6, Dodgson-terrace, Acomb, York.

## SCOTLAND.

**Edinburgo.**—La 6an de Oktobro la grupo komencis sian vintran laboron. Pro la neĉeesto de la prezidanto, D-ro Scougal, kiu estis malsana, la tasko fari la prezidentan antaŭparolon estas entreprenita de S-ro Page, vic-prezidanto. S-ro Page proponis kelkajn kuraĝigajn pensojn komparante la nunan tempon kun la unuaj tagoj de Esperanto.

La 13an de Oktobro okazis socia kunveno de la anoj kaj iliaj amikoj en la Hotelo Carlton. Pli ol 70 ĉeestis, kaj oni pasigis tre plezurigan vesperon per koncerteto, vistrondo kaj kuna noktmangado.

Kun profunda bedaŭro la grupo ricevis la anoncon pri la morto de unu el la anoj, ERIC M. MORISON, kiu falis en Septembro sur la batalkampo en Flandro.

**Glasgow.**—This society held its opening meeting for the winter session in the Royal Philosophical Society's rooms on the 4th October, when Dr. John Pollen, of London, lectured on "Esperanto and the War." A full report appears on another page. The *Glasgow Herald*, *Scotsman*, and *Evening Citizen* reported the lecture in considerable detail.

S-ro JACK EDWARDS, Aberystwyth, skribas:—

"Laŭ peto de la Fako de Edukado, mi sendis 250 *Esperanto for All* par la malliberula kampo ĉe Ruhleben, Germanujo. Vidinte deziresprimon en la *Daily News* mi proponis sendi ian nombron ĝis mil. Kaj oni petis 250."

## IRELAND.

**Belfast.**—The group held the first meeting of the season on Monday, September 27, under the leadership of Mr. F. Farrington, 7, *Fitzwilliam-avenue*. Another successful season is anticipated. Later in the week the writer was delighted to meet, by pure chance, or maybe providentially, our esteemed *samideanon*, Colonel Pollen. Such an opportunity for propaganda rarely comes Belfast way, and we did not fail to take advantage of it. On Friday, October 1, the learned Doctor met a group of members and friends, many of whom, for the first time, not only heard something of what Esperanto is in itself, but realised, by the spirit of the man who spoke to them, what the movement really stands for. By special request of one who will never forget Colonel Pollen's contribution to the success of a B.E.A. Congress Meeting in Ireland, our visitor recited, in his inimitable way, the beautiful verses by Bret Harte on Dickens, in addition to a humorous piece by the same author, which was equally appreciated. Before saying adieu, Mr. J. O'Callaghan, a visitor who is also a gentleman not unknown to the literary world, expressed his personal appreciation of the delightful evening he had spent, and in the name of all present he heartily thanked our esteemed kaj amatan gaston.

## GREATER BRITAIN.

**Natal, S. Afriko.**—Kun granda bedaŭro, sed ankaŭ kun granda fiero, ni de la Grupo "Verda Stelo" devas anonci al vi la foriron el nia rondo de nia prezidanto, Sinjoro Leonard Wood, kaj nia kasisto, Sinjoro Harry Wood. Ambaŭ samideanoj forveturis al Potchefstroom la 30an de Aŭgusto, kie ili fariĝos soldatoj de la Sud-Afrika Armeo, kiun oni nun organizas por sendi al Eŭropo aŭ alia parto de la mondo, laŭ la ordonoj de Lordo Kitchener.

Estas kompreneble granda perdo, almenaŭ protempa, por nia societo, sed ni fervore esperas, ke post nelonge ili revenos en nian rondon post la venko de la malamiko.

Kiel signo de nia estimo, la societo prezentis memorajojn al la du sinjoroj antaŭ ilia foriro.

Ni deziras atentigi al vi ke dum siaj vojaĝoj la du samideanoj estos tre feliĉaj se ili povos renkonti alilandajn gesamideanojn. Ne estos malfacile komuniki kun ili, ĉar estos nur necese adresi sin al la Durbana sekcio de la Armeo.

La 26an de Aŭgusto, mortis en tiu ĉi urbo Doktoro J. Medley Wood, D.Sc., A.L.S., Direktoro de la ĉi-tieaj Botanikaj Ĝardenoj, kaj onklo de nia prezidanto kaj kasisto. Doktoro Wood estis simpatia subtenanto de la Esperanta movado kaj protektanto de nia Societo. Li mortis en sia 88a jaro.

La ĉiusemajna vespera kurso, malfermita je la komenco de Marto finiĝis en Aŭgusto. Ni starigos novan kurson por komencantoj la 7an de la kuranta monato.

## British Esperantists serving in the Army, Navy, or Red Cross.

## EIGHTH LIST.

- DEWAR, A., Private, Dundee.
- HAINES, WM., Corp., Rifle Brigade.
- PREVOST, Rev. P. G., M.A., R.C. Chaplain to the Forces
- RIDYARD, D., Sergt., 4th South Lancs., B.E.F.
- TEDMAN, C., Lieut., Lahore Division, Indian Expy. Force.
- TODD, JOHN, Gateshead Group, R.A.M.C., France.
- WALKER, H., Private, R.N. Hospital, Plymouth.
- WOOD, HARRY, Kasisto de la Natala Verda Stelo, South African Force.
- WORTHINGTON, Miss G., Commandant, Red Cross Hospital, Leek.

## D-ro L. L. Zamenhof.\*

El la Aŭg.—Sept. numero de la *Germana Esperantisto*, ni kun ĝojo sciigas, "ke D-ro Zamenhof kun sia Edzino, malgraŭ la malfaciloj resultintaj el la siego kaj okupo de Varsovio de la germanaj trupoj, restis en tiu urbo kaj troviĝas en bona sanstato. Kelkaj Esperantistoj el la germana armeo vizitis ilin. Oni esperas, ke rekta interkomunikado baldaŭ realigos."

Jen ripeto de la anonco, kiun sendis al ni D-ro Zamenhof la 15an de Julio: Pro kelkaj cirkonstancoj (kiuj havas karakteron pure personan kaj nenion koncernas la sorton de nia lingvo) mi deziras vendi por ĉiam la aŭtorajn rajtojn pri ĉiuj miaj verkoj (kompreneble nur en tiu grado, en kiu ili estas mia propraĵo). Kiu deziras aĉeti, volu sin turni al mi.—L. L. ZAMENHOF, Varsovio, str. Krolewska, No. 41.

## Al la Naciaj Societoj Esperantistaj.

Ĉar la nuna situacio politika estas malfavora al internaciaj rilatoj, estus dezirinde, ke oni laboru almenaŭ en ĉiu aparta lando por subteni la propagandon kaj la naciajn gazetojn Esperantistajn. En multaj landoj, precipice en la malgrandaj, la propagando preskaŭ ĉesis pro la milito kaj la nacia societo dormas, kredante ke oni nenion povas fari ĝis la paco estos restarigita.

Tio estas eraro: ekzemple en Svislando la movado tute ĉesis lastan jaron pro la milito; tamen tiun ĉi jaron la estraro de la Svisa Societo decidis rekomenci la laboron; oni elektis novan prezidanton kaj novan kasiston, fondis en Bern Centran Oficejon kaj la Societo estas nun bone reorganizita, oni anoncas ĉie kursojn de Esperanto por la vintra sezono kaj oni esperas, ke ankaŭ la nacia gazeto, *Svisa Espero*, baldaŭ reviviĝos.

Ni esperas, ke en ĉiuj landoj, kie la Esperanta movado nun dormas, oni komprenos, ke la nuna momento estas tre oportuna por reveko de la naciaj societoj kaj de la propagando, tiamaniere ke tuj post fino de la nuna bueo, la Esperantista popolo sin retrovos pli bone organizita kaj eĉ pli grandnombra ol antaŭe.

Estus dezirinde, ke la estraroj de la diversaj naciaj societoj interrilatu pli ofte kaj pli regule. Por korespondi kun la Svisa Esperanta Societo oni adresu ĉiujn leterojn al la "Centra Oficejo de Sv. sa Esperanta Societo, 10, Hotelgasse, Bern."

R. DE SAUSSURE, Prez., S.E.S.

5. 10. 1915.

Mr. JOSEPH ALMOND writes:—

"Sandbags—more sandbags—is the urgent and constant cry from the Front!"

This is what appeared in the B.E. October number, among other outbursts of "patriotism."

Will the writer, and those who agree with him, remember that it would be more patriotic if, instead of the members wasting a club evening in doing a penny-worth of work, they would subscribe towards a fund in order to pay a poor woman (or women) to do the work, and thereby not only save soldiers' lives, but also save a few poor women's souls?

It is false patriotism for well-to-do Esperantists to do the work, whilst there are a good many poor half-starved women—and perhaps children to support—who are anxious to earn a livelihood.

Of course, there is no need to give it to someone who wishes to make a between-profit, but directly to some poor woman (or women)—there are plenty about.

\* Vidu ankaŭ pg. 203.

## Fallen in Battle.

S-RO W. WATSON, Regimento 1a West Riding ; alirinte tranĉeon li ricevis kuglon en la stomakon kaj tuj mortis sen suferado. Li lasis edzinon kaj tri infanetojn ; al ili la plej eblan konsolon. Li estis tre kvieta sed fervora subtenanto de nia idealo kaj precipice inter la fervojistoj de la urbo Huddersfield faris propagandon dum multaj jaroj. Lin funebros granda rondo de amikoj kaj samcelantoj.

ERIC MAURICE MORISON, Edinburgh Group, 5th Cameron Highlanders, aged 22, on 26th September, in Flanders.

We regret also to announce the death of Capt. ARCHIBALD C. MILLER, of Carnethy, Roslin, who was killed in a serious accident on the railway, when a train dashed into the rear of a party of soldiers, killing the officer and one private and injuring eight rank and file. Capt. Miller was the son-in-law of our well-known and esteemed *samideano*, Mr. J. M. Warden, of Edinburgh, to whom we offer our sincerest condolences.



## Libraro kaj Gazetaro.

**Adele Kamm**, de Paul Seippel. El Franca lingvo tradukis D-ro René de Saussure. Dua eldono Esperanta. 169 paĝojn kun portreto, Sm. 1.200 ; aĉetebla ĉe Presejo Büchler & Co., Bern, Svisujo, kaj ĉe Centra Oficejo de Svisa Esperanta Societo, 10, Hotelgasse, en la sama urbo.

Multaj Esperantistoj kore bonvenigis tiun ĉi bonegan tradukon el la lerta plumo de D-ro R. de Saussure precipice post la apero de liaj majstraj verkoj : "La Vort-Torio en Esperanto" kaj "Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en Esperanto."

Per sia libro, kiu jam vidis kvin eldonojn, la aŭtoro prezentas al ni kun kortuše ama simpatio la vivon kaj la suferojn de eksterordinare altanima kaj dolĉa junulino. Li ebligas al la leganto ĝisfundan evidon en mirinde belan, puran kaj amemam animon ; ni tuj komencas ami tiun malegoistan sanktulinon kaj ni baldaŭ sentas nin sub la ĉarmo de ŝia alloga personeca. Malgraŭ seninterrompaj, teruraj suferoj en la daŭro de ses jaroj ŝia koro estis ĉiam plenigita de profunda, sankta ĝojo kaj fervora deziro komunikigi tiun ĝojon al kiom eble plej multaj aliaj suferantoj. La sekreto de tiu preskaŭ mistika raviteco estis ĉiam konscio pri la amo de Dio. Legante la libron multaj sendube trovos por si solvon de la mistero de l' sufero antaŭ la amo de Dio. Mi despli ĝuis la legadon, ĉar mi havis la altatatan privilezion de intima amikeco—animparencecon mi plivole nomas ĝin—kun du similaj, belaj animoj, kaj ĉe ĉiu paĝo venis al mi en la memoron la multaj sanktaj horoj pasigitaj kune kun ili. *Adèle Kamm* estas animaltiga biografio, kaj mi deziras al ĝi grandan legantaron kaj grandan utilecon. Same leginda estas broŝuro verkita de Adèle Kamm : "Eĉ en doloro ni estu ĝojaj," tradukita Esperanten de E. Ramo.

En antaŭparola "Averta" D-ro R. de S. diras, ke, laŭ rekomendo de la Akademio Esperantista, li penis eviti la trouzon de nenecesaj sufiksoj, sed konfesas, ke, dum multaj aŭtoroj trošatas la principon de neceso, li, eble, trošatas la principon de sufico. Efektive en la komenco de la legado (*eble* mi devus skribi "lego") oni ofte ne povas ne halti por konsidero, renkontante tiajn vortojn, kiajn : sankto, humilo, pio, gajo, certo, noblo anstataŭ sankteco, humileco, pieco, k.t.p. Iom post iom oni alkutimiĝas al la mallongaj formoj kaj, en la plimulto de la okazoj, oni trovas ilin suficaj, trafaj kaj eĉ belaj. Tamen en kelkaj okazoj mi preferus la ĝis nun ordinare uzitajn formojn, ekzemple : *seriozeco* de la vivo, anstataŭ *seriozo* ; *estonteco* anstataŭ *estonto* ; *okazintajo* anstataŭ *okazinto* ; *gastigata* anstataŭ

*gastata* ; (pp. 4, 5) tiu ĉi anstataŭ *tiu*. Ankaŭ troviĝas kelkaj dubaj esprimoj kiel la jenaj : (p. 15) *sen ke* ; (p. 20) *la suno daŭrigas brili* ; (p. 25)... *animon trempigis en la sanktajn akvojn* ; (p. 40)... *saligas nin en malesperan humoron*, tiel nesaĝa kiel la iluzioj ; (p. 111) *la plej feliĉa el kiujn mi konas*. Sed, krom ĝaj dubindajoj, la traduko estas tre bela, kaj la stilo mirinde glata kaj facile.—H.A.L.

**Gazetoj Ricevitaj.**—*Esperanto Monthly* (Oktobro—Novembro).

*La Espero* (Septembro kaj Oktobro).—Organo de la Sveda kaj Norvega Societoj.

*Korespondanta Kurso*.—Memlernilo de Esperanto por hino (22—23) en la hina lingvo kaj Esperanto, eldonita de la Centra Oficejo de Hina Esp. Asocio, Ŝanhajo.

*Brazila Esperantisto*.—Oficiala organo de "Brazila Ligo Esperantista" (Majo—Junio).

*Esperanto*.—Oficiala organo de U.E.A. (Oktobro 5).

*Germana Esperantisto* (Aŭgusto—Septembro kaj Oktobro).

*Kataluna Esperantisto*.—Oficiale presorgano de la Kataluna Esp. Federacio (Septembro).

*L'Esperanto* (Junio—Julio).—Revuo sub la patronado de la Italala Katedro de Esperanto, enhavas bonegajn lecionojn de klasikaj kaj vivantaj lingvoj ankaŭ de stenografio per Esperanto.

*Le Monde Esperantiste* (Septembro).

*La Naturisto*.—Hektografita gazeteto (Septembro—Oktobro).

*Bulteno de H.C.E.* (Julio), en la lingvoj japana, angla kaj Esperanto, organo de la Internacia Asocio por Interŝangantoj kaj Kolektantoj de diversaj objektoj. Oficejo : 28, Shinagawacho, Kanazawa, Japanujo.

*Holanda Pionoro* (Oktobro).

*Japana Esperantisto* (Julio—Aŭgusto).—La Aŭgusta numero enhavas tre interesajn artikolojn pri la insulo Formosa.

*Pacifika Espero* (Septembro).

*La Ondo de Esperanto* (Septembro—Oktobro) el Rusujo, legindajoj : "Kiel la Milito influis Esperanton," "Nekrologo, M. L. Gutman," Humoraj el Ĉehov.

## La "Edinburga" Esperanta Vortaro.

En la julia numero de B.E. mia bona amiko, Ro So—jam sufiĉe diverskapabla—alprenas al si ankoraŭ novan rolon, nome tiun de predikisto, kaj, elektinte tekston el la "Deklar(aci)o pri Esperantismo," admonas min pri grava peko kontraŭ la Fundamento de Esperanto. Mi certigu al li, ke li ne estas la sola lojala fundamenteisto : mi pretendas esti ĉiurilate tiel fidela al la spirito de la Fundamento kiel li, kvankam ne min ligante blinde al ĝia nura litero ; kaj mi do ne povas allasi, ke mi dekliniĝis de la reguloj kaj modeloj en la Fundamento.

La aparta vorto, pri kiu plendas Ro So, estas *pundo*, kiu aperas—tute ne por la unua fojo—in la "Edinburga" Vortaro, kiel traduko de la brita *£* (kion Ro So ne guste nomas "angla" monero). Li asertas, de D-ro Zamenhof elektis *funto\** por tiu senco kiel ankaŭ por la senco de pezo. Tion mi tre dubas. En *Universala Vortaro* estas nenio, kio pravigus tiun aserton, sed tute kontraŭe. La sola monero nomata en *U.V.* estas la malnova, jam ne ekzistanta *grošo* (groat, groschen) ; kaj mi nur povas konjekti, ke ĝia apero estas pro tio, ke ĝi signas malgrandan sumeton, kiel la moneretoj de la vidvino en la Nova Testamento. La vorto *franko* aperas en *Ekzercaro*, sed ne en *U.V.* El tio oni rajtas konkludi, ke la aŭtoro de Esperanto intencis, ke la naciaj nomoj estu uzataj por la diversaj monunuoj. Estus ja tre strange, se li estus elektinta nomon por nur unu el tiuj, ne eĉ citinte la fakton en *U.V.* La *Oficiala Aldono al U.V.* enhavas iujn, sed ne ĉiujn, monerojn : *cendo, centimo, dolaro, franko, guldeno, kopeko, pence, pfenigo, rublo, šilingo*. Ĉiuj tiuj estas la naciaj nomoj,

kun ŝanĝetoj por konformigi ilin al la Esperanta ortografio aŭ por evitigi konfuzon kun aliaj radikoj.

Estas evidente, ke en iu ajn internacia lingvo—precipe en nia Esperanto, kiu ĉiam celas reprezenti ideojn kaj ne nurajn vortojn—estus tute nelogike, se du tute malsamaj aferoj estus signataj per unu sama vorto. Estas senutile, pledi la internaciecon de la duobla signifo de la responda vorto en la naciaj lingvoj; ĉar en aliaj similaj okazoj Esperanto ne sekvas ilian malbonan ekzemplon. La U.V. de D-ro Zamenhof donas *futo* kaj *piedo*, *glaso* kaj *vitro*, *ordo* kaj *ordeno* kaj *ordono*, k.t.p., kvankam en iuj gravaj lingvoj naciaj unu sola vorto estas uzata por la du aŭ tri senco. Ĉu, ĉar la komplilintoj de la Edinburga Vortareto sekvis la modelon de D-ro Žamenhof kaj donas apartajn radikojn por apartaj ideoj, iu rajtas nomi ilin dekliniĝintoj de la Fundamento?

Se Ro Ŝo bonvolos sin turni al la vortaroj Esperantaj de diversaj landoj, li rimarkos, ke la plimulto el ili emas limigi *funto* al la senco de pezo, kaj ke aliaj, kiuj uzas ĝin ankaŭ por la monero, ordinare aldonas la adjektivon *sterlinga*, kun la intenco pliprecizigi la sencon. Mi tute konsentas kun Ro Ŝo, ke estas dezirinde forpeli senbezonajn vortojn; kaj, same opiniinte, la komplilintoj de la Vortareto ellasis interalie la nenecesan, neaprobitan,\* kaj ne bone komprenatan de alilandanoj radikon *sterling*.

Estas bedaŭrinde, ke en la lastaj jaroj iuj Esperantistoj kutimiĝis uzi *funto* por £, kontraŭ la veraj principoj de nia lingvo; sed estos strange, se tiu grava mona unuo—pli altvalora, ol ĉiuj aliaj—devos sola resti sen propra, logika, difinita Esperanta nomo. Tia nomo estas *pundo*, deveninta de malnovangla vorto *pund*, kaj ne bezonanta ian aldonan vorton por sin precizigi.

Mi iam diskutis kun Ro Ŝo la alian vorton *livro*, ofte proponitan por £ kaj aperintan en kelkaj vortaroj; kaj estis precipe pro lia opinio, ke mi ĉesis uzi ĝin en miaj privataj aferoj. Sajnas, ke, kiel la maljunulo en la konata fablo, mi ankaŭ ne sukcesis plaĉi al li per la alternativa vorto! Tion mi bedaŭras; sed mi ne povas sekvi lin, per uzado de la mallogika *funto*.

Rilate al la radiko *kapitulac*, permesu, ke mi diru, ke en la unua parto de la Vortareto ĝi aperas plene: *kapitul(ac)*, kaj sendube estus pli bone, se ĝi aperus tiamaniere ankaŭ en la dua parto. La antaŭparolo jam klarigis la motivon de la komplilintoj pri tiaj vortoj, kiajn citis via recenzisto en la junia numero de B.E. En nur malmultaj vortoj aprobitaj ni proponis la ellason de kvazaŭafiksoj: ekz., anstataŭ *konjugaci* ni uzas *konjug*; ĉar troviĝas en *Fundamenta Krestomatio* la vorto *konjugado*, kies radiko certe estas *konjug*.

Mi uzas la nunan okazon, por kore danki al korespondantoj montrintaj kelkajn preserarojn en la Vortareto; kaj mi estos tre kontenta ricevi pluajn korektajojn aŭ sugestojn.

J. M. WARDEN.

41, Cluny-drive, Edinburgo,  
30an de Septembro, 1915a.

\* Ĝia uzo estas aprobita de Zamenhof en *Fundamenta Krestomatio* ("modeloj legdonaj por ĉiuj," "modelo de Esperanta stilo" v. *Antaŭparolo*), pg. 70.—La plimulto el ni rilate al ĉi tiu kaj al ĉiu alia stila afero nepre preferos sekvi la ekzemplon de la "plej sperta Esperantisto," ol tiun de iu alia.—[RED., B.E.].

#### Novaj Libroj.

**Adele Kamm** (Paul Seippel), trad. RENÉ DE SAUSSURE .....

**Lia Lasta Ŝanco** (Bernard), 2-akta komedio, trad. GEGO .....

**Pri Cervantes kaj lia fame konata verko "El Quijote."** Eldonita de la Madrida Esperantista Grupo .....

s.	d.
2	8
0	8½
1	0

#### En la Hejmo de D-ro Zamenhof.

El letero de kapitano G. al la germanaj esperantistoj.

La 17an de Sept., 1915.

*Karaj samideanoj!*—... La tagon post mia alveno en Varsovio mi provis, trovi nian estimatan majstron Z. Mi timis, ke li estis devigita, forlasi sian urbon. "Adreslibro" ne ekzistis en Varsovio, sed per la telefon-tabelo mi trovis la nomon D-ro Z. Tiamaniere mi unue venis post kelka serĉado al la frato de nia majstro, kiu havis la afablecon, konduko min al la viro, kies verkon mi estimas ju pli longe des pli alte. Li logas Krolewska 41 en bela domo, en la plej bona regiono de Varsovio, proksime de la saksa ĝardeno, belega parko meze de l' urbo.

Tre afable li akceptis min, kaj ni, li, lia frato kaj mi, babiladis pri milito, Esperanto, pri konataj al ni esperantistoj, rusaj kaj germanaj batalantoj, k.t.p. Mi estis feliĉa, povis saluti la eltrovinton de Esperanto en lia hejmo, kaj tiu vizito estis por mi unu el la plej gravaj travivaĵoj de la milito, dum kiu mi ja havis multajn impresojn profundajn. Dum la pasinta jaro la milito ne permisi al mi, konatiĝi kun la majstro en Parizo, mi forkuris al la standardoj de mia imperiestro orienten. Kaj nun la sama milito kaŭzis al mi la feliĉon, stari kontraŭe de la majstro, ne nur dum la ĉeesto de multaj homoj, sed esti lia gasto. Tiamaniere ĉiu okazaĵo posedas du flankojn, eĉ la milito.

La posttagmezon la afablega edzino de nia majstro gastigis min per la rusa samovaro, kaj ŝi rakontis vigle, kiajn malfacilaĵojn la vojaĝo de Kolonjo (Köln) ĝis Varsovio en la pasinta jaro kaŭzis al ŝi kaj ŝia edzo. Dum pluaj tagoj ili veturis en kupeo de la tria klaso, ne mangante suficon, sen suficiaj tolajo kaj vestaĵo. Ankoraŭ hodiaŭ la valizoj de D-ro Z. staras en Berlino! Preter Sassnitz, Stockholm, Petersburg la geedzoj Z. fine atingis sian hejm-urban V., S-ino Z. timis pro la saneco de ŝia edzo, sed ankoraŭ li restis bonstata. Nia majstro ofte devis forlasi nin, por akcepti la malsanulinojn; estis konsulta horo!

Fine mi adiaŭis, akompanata de la plej bonaj deziroj de gesinjoroj Z. por mia bonfarto.

Ĉu vi volas scii, kion mi ĉefe devas diri pri nia estimata majstro? La plej rimarkinda trajto de lia karaktero sajnas al mi granda modesteco kune kun afabla boneco kaj agrabla indeco. Neniel li rimarkigis la "grandan viiron." Kaj la edzino? Ŝi estas la plej afabla mastrino, kiun vi povas imagi.

Tio estis mia interesa vizito ĉe D-ro Z. Mi esperas, ke ĝi estas interesa por vi, kaj ĉiuj legantoj de via gazeto, kaj ke ĉiu esperantisto ĝojos, audi pri la bonfarto de nia amata majstro kaj lia edzino.

Esperantan saluton!  
El Germana Esperantisto, Okt. numero,  
ricevita 27/10/15.

## La Senkompata Bienulino.

*Kampara rakonto el libro titolita "Ernest Staas"*  
de ANT. BERGMANN.

Mario Goebloed (elp. *Gublud* = Bonsango) estis konata de ĉiuj jugistoj, advokatoj kaj jugaj persekutistoj, kiel senkora virino, riĉa sed treege avara, vivanta kiel almozulino kaj prenanta ĝis la lasta soldo de la malriĉuloj.

En unu el ŝiaj domoj, defalanta stalo senaera kaj senluma, logis malriĉa vidvino. Si restis kun kvin idoj, la malplej juna el kiuj estis sepjara kaj la plej juna nur kelkmonata. Per laborado kaj penado, de frua mateno ĝis tre malfrua vespero, ŝi sukcesis gajni po unu franko ĉiutage kiel stalzorgantino.

Unu franko por ses personoj!

Kaj tamen, kiajn mirindajojn de pureco kaj sajna komforto oni vidas ĉiutage prilaboritajn de niaj flandraj dommastrinoj per tia malgrandeta salajro! Ankaŭ ĉe Vidvino Peeters la domo estis pura, kaj la infanoj, bonorde vestitaj, regule ĉeestis la lernejon, neniam almozpetis eĉ unu cendon (du centimojn) de kiu ajn. Dimanĉe, kiam la kolektisto de lupagoj alvenis kun sia blua sako, li ĉiam trovis la lumonon preta en la tera pelveto ĉe la angulo de la kamenbreto. Vere estas, ke pli ol unufoje la infanoj estis enlitigitaj sen pano: estis ja tiom ses grandaj soldoj (60 centimoj) por la semajna lupago, sed preferinde estis suferi pro malsato ol ne havi la lastan moneron preta!

Tiel la malriĉa vidvino pene venkis la malfeliĉan sorton jaron post jaro; nun ŝi povis esperi ian helpon. La malplej juna knabeto ekfaris komisiojn kaj jam alportis ian helpon hejmen.

Jes, la estonteco montrigis feliĉoplena al la bona patrino.

Si ŝi ĝin pripensis iun vesperon, kiam apud peceto da kandelo ŝi sidis kudrante, farante el veŝto postlasita de la edzo vestaĵeton por sia plej maljuna knabo.

La laboro ŝajnis malfacila. La ŝtofo ne estis fortia, kaj la tranĉado nekontentiga; ŝi tamen turnis kaj returnis ĝin, kaj rideto sur ŝia vizaĝo montris, ke fine ŝi trovis solvon, kaj ŝia Eduardo povos dece aperi publike. Si atendis la knabeton, por ke li povu ĝin prove almeti, kiam la pordo per puŝego malfermiĝis, du viroj envenis kaj sen unu vorto demetis sian ŝargon sur la lito. La malfeliĉa virino alkuris, forpuŝis la virojn kaj rekonis sian malplej junan fileton, sian Eduardon, kiu, dangere vundita en la kruro, estis senkonscia.

La malfeliĉa knabeto, kiu, kiel ĉiuvespere, estis alportanta la ĵurnalon al maljuna sinjoro, estis neatendite renversita de veturilo ĉe stratangulo kaj grave vundita.

La veturigisto, post la akcidento, fortege

vipis la ĉevalojn, kiuj galope forkuris; sekve neniu povis rekoni la posedanton nek la konkiston.

Neniu sin okupis pri la knabeto, kiu, senkonscia, estis prenita de du laboristoj kaj alportita al sia hejmo.

La neatendita bato estis tro forta por la patrino. Tutajn tagojn kaj noktojn ŝi pasigis ĉe la lito de sia malsana infano. Si estis devigata forlasi sian laboron, pagi zorgojn kaj kuracilojn, tiel ke ŝi, kiu neniam al iu ion ŝuldis, fine el ŝuldoj ne povis eliri.

Por la unua fojo, kiam la kolektisto venis kun la monujo, la ses grandaj moneroj ne estis pretaj kaj li vane palpis en la pelveto.

La malfeliĉa virino ne kuragiĝis lin alrigardi; ŝi sentis, ke la ruĝo de honto kolorigas ŝiajn vangojn; ĉar neniam antaŭe tio okazis je ŝi! Poste, ŝi ekrigardis sian dolorantan infanon kaj ekkuragiĝis. Si klarigis ĉion; kun larmoj en la okuloj petegis pri prokrasto, kaj el sia patrina koro trovis vortojn sufice fortajn por moligi rokon kaj kortuŝi kolektiston de lupagoj.

Li promesis, ke li parolos al sia dungintino favore de la vidvino, kaj ne dubis, ke ŝi konsentos. Malpli ol unu horon pli malfrue Mario Goebloed persone ĉeestis la domon.

Si sidiĝis, rakontigis denove la tutan aferon, lasis la malriĉan vidvinon elverŝi ĉiujn larmojn, kaj fine decidis per voĉo, al kiu ŝi provis havigi akcenton de kompato:

"Via malfeliĉo estas granda, virineto; sed estas feliĉe, ke vi rilatas kun bonaj personoj."

"Vi scias, ke mi ĉiam estas plena je indulgo por la malriĉuloj, kiuj faras, kion ili povas, kaj, ke neniam zorgema luiganto plendis pri mi."

La malriĉulino per kapgestoj konsentis, kvankam ŝi neniam vidis signon de la boneco de Mario Goebloed.

"Ĉiam vi ĝuste pagis, mi fidos je vi kaj sen malfacilajo permesos al vi prokraston."

— "Vi estu dankata, Fraŭlino," ekkriis la vidvino. "Dio rekompencos vin, ĉiutage ni ambaŭ preĝos por vi!"

"Sed," daŭrigis la bienposedantino, ne priatentante tiujn vortojn, "sed poste vi honeste ĉiusemajne malgrandigos la ŝuldon."

"Certe," diris la luantino.

"Kun la legaj procentaĵoj?"

"Ĉiom, laŭ via peto, fraŭlino. Mi faros kion vi deziras, se nur vi estu iom kompata, kaj havu iom da pacienco!"

"Tio estas komprenebla; sed, se mi donas al vi tempon, vi komprenos, ke mi devas zorgi por esti pagata pli malfrue."

"Ha," timeme ekkriis la vidvino, "tagon kaj nokton mi laboros por vi. Tio, kion mi posedas, estas je via dispono, kaj kun feliĉo mi cedos ĉion; ĉar, vi donas al mi pli ol la vivon, vi savas mian malfeliĉan infanon!"

"Jen estas bonaj projektoj, virineto," diris Mario Goebloed je la sama malvarma, sensenta tono, "mi ne eĉ momenton dubas pri via promeso; sed ĉu vi ne troviĝos en nebleco ĝin teni? Se vi daŭrigos vivi kiel nun, ĉu vi ne opinias, ke ĉiutage vi malantaŭeniros kaj pli profunde enšuldigos? La elspezoj superas la profitojn."

"Vi devas ofte resti hejme, viaj klientoj perdiĝas, la ŝuldoj kreskas; tial, virineto," kaj ŝi premis la tremantan manon de la malfeliĉulino, "mi devas doni al vi bonan konsilon je via propra bono. La ŝargo estas tro peza por vi. Se mi estus vi, mi sendus mian infanon al la malsanejo..."

La vidvino aŭskultis la diraĵojn de la financisto unue kun konfuzo, poste kun timo; je la lasta vorto, ŝi forigis la malvarman manon de la konsilantino, ekleviĝis, kuris al la liteto de la infano, kaj premis la buklan kapeton en siaj brakoj; laŭte ekploris patrino kaj filo.

"Nu, nu," dorlote diris Mario Goebloed, "tion ne tiel prenu, konsideru ĝi foriro! En malsanejo oni estas pli bone prizorgata ol ĉe hejmo." Kaj kredante, ke la ploroj iom malfortiĝis, ŝi aldiris, "Mi forprenigos la infanon hodiaŭ posttagmeze."

"Forpreni mian infanon!" ekkriis la patrino, turnante sin kiel sovaĝulino, "disigi min de mia malsana knabo! Ĉio, ja, sed tio neniam!" kaj la malkvietigita virino pli forte premis sian infanon kontraŭ sia brusto.

"Mi tre bedaŭras," respondis Mario Goebloed, flegme, "sed tiam mi ne povas konsenti al vi prokraston, ĉar mi estas certa ĉion perdi," kaj ŝi ekmontris, ke ŝi volas forlasi la ĉambron.

Tiam sekvis la plej dolorpleniga vidaĵo.

La infano petis kaj petegis el sia dolorlito, la patrino ploris kaj gemis, altiris la virinacon per la vestaĵoj, premis ŝiajn manojn kaj falis sur genuojn; sed ĉio, vane.

"La infano al la malsanejo aŭ vi el mia domo!" ŝi malafable kriis, repuŝante la vidvinon, kaj forlasis la malriĉan hejmon, fermante la pordon post si kun granda brujo.

Dek tagojn poste, ŝi estis devigata forlasi la domon kun la suferanta infano, kiu devis esti transportita sur la lito.

Tiu nehumana konduto naskis grandan ribelon.

La vidvino fariĝis de ĉiu honorata kaj amata, la bienulino malamata kaj malestimata.

En la ĉirkaŭajo levigis kontraŭ ŝi krio de ĝeneralaj abomenoj, kaj kompreneble la plej laŭtaj kriantoj estis tiuj luantoj, kiuj ne ĉiam estis pretaj pagi.

*Tradukita el la flandra lingvo de*

PAUL BLAISE.

## La Konkurso.

*Originale verkita de "TAGULO."*

Mi estis banka komizo, kiam mi unue koniĝis kun Arturo Benham. Ofte ni interŝangis kelkajn vortojn, kiam li eniris la bankon. Li estis arĥitekturnisto kun tre malgranda klientaro, fakte li estis tute maljuna kaj ne sukcese enspezis per sia profesio. Mi supozas, ke li havis la agón de ĉirkaŭ sesdek jaroj. Dum du jaroj mi konis lin, sed neniam ni promenis kune aŭ vizitis unu la alian. Mi en tiu tempo estis vidvo kaj loĝis en ĉambroj; li ankaŭ loĝis en ĉambroj kaj estis fraŭlo. Ni ne havis multon komunan, kaj mi opinias, ke se okaza fariĝo ne amikigus nin, ni restus nur konatuloj ĝis hodiaŭ. Tiu ŝanca fariĝo okazis en la stacidomo unu matenon frue, kiam mi iris al Londono. Li venis tien ĝustatempe por la ekiro de la vagonaro, sed kun si li ne havis monon. La vojaĝo estis longa, sufice multekosta kaj aferoj tre urĝis al li, kaj ĉar mi estis apude, kiam li trovis sian mankon, li sin turnis al mi por helpo; kiun mi ĝoje donis. Ni vojaĝis kune al Londono, restis ĉe la sama hotelo dum kelkaj tagoj, kaj kiam mi fine devis forlasi lin kaj diri adiaŭ, li petis, ke mi vizitu lin unu vesperon, post kiam li ree hejmeniĝos. Tion mi faris, kaj de post tiam ni fariĝis pli kaj pli amikaj. Mi trovis, ke li estas tre lerta pri sia profesio, aŭ arto, kiel li ĉiam nomis ĝin; plenuminte tre altgradajn ekzamenojn kaj ricevinte kelkajn premiojn. Studema kaj legema li estis, kaj tio donis al li tre kvietajn manierojn kaj retiriĝeman karakteron, kiuj, kvankam tre plaĉaj, kiam oni bone konis lin, tamen ne venigis al li klientaron. Li ja konstatis tion kaj klarigis al mi, ke sub la nunaj sociaj kondiĉoj (kondiĉoj li nomis ilin) la vera arteca, studema arĥitekturnisto ne povas sukcesi en sia profesio, se li ne havas kunlaboranton kun multe da aplombo kaj amo al la societa vivado. Ĉar, li klarigis, por havi klientojn oni devas partopreni kun la riĉuloj ilian societan vivadon kun ĝiaj sportoj, baloj, koncertoj, k.t.p., kaj meze de ĉio ĉi reklami sin kiel lertulon. "Mi neniam kutimis al tio, mi ĉiam devis studi kaj verke enspezi," li diris. Aliflanke, li klarigis, kiam venos la socialismo, tiam homo ne timos, ke li mortos pro malsato, tiam homo ne prostituos sian arton al la nekleraj riĉuloj, tiam oni scios, ke la vestoj, mangoj kaj logejoj estos garantiataj al ĉiu homo, se tiu laboros. Tiam la talentuloj kaj geniuloj ne estos sub la povo de la neklera riĉulo, tiam la arto kaj la scienco estos liberaj.

"Sed kiel vi prostitucas vian arton?" mi demandis.

"Jen venas al mi riĉa neklera kliento," li

respondis, "kaj petas, ke mi konsilu kaj plane verku por li domon. Sed ĉar lia tuta vivado baziĝas sur nenaturaj vivmanieroj, li havas nenaturajn ŝatojn kaj volas konstruigi aferojn, kiuj tute ne estas utilaj aŭ belaj : sekve, ĉar mi estas malriĉa, mi ne povas riski ofendi lin, kaj mi helpas al li konstruigi siajn malbelajojn. Jen kiel la malriĉeco faras min prostitui mian arton. Same estas pri la pentristoj kaj aliaj artistoj ; ili estas sklavoj sub la publiko, ili devas plaĉi al la popolo aŭ malsati. Sed en la venonta socio la arto estos libera, kaj artistoj ne verkos por mono, sed por ĝuo kaj emulo al la verkado."

Ni logis en apudmara urbo negranda, kie preskaŭ ĉies aferoj estas bone konataj. Sed oni ne sciis multon pri Arturo Benham ; oni diris, ke li estas tre stranga homo, kiu neniam ĉeestas la preĝejojn, ne vizitas la koncertojn, ne vestas sin speciale por dimanĉoj, ne nigre vestas sin por funebro, ne dansas ĉe baloj kaj eĉ ne ludas per kartoj. Eble mi pli bone konis lin, ol iu alia, kaj se mi dirus al liaj samurbanoj ĉion, kion li faris, tiam vere ili nomus lin strangulo. Kiam li dum sia foresto de la oficejo ne vagis sur la kamparon, li laboris super iu neofta afero aŭ legis librojn strangajn por mi, librojn pri la okultismo, spiritismo kaj tiaspecaj.

Li nun laboris super konkursa projekto por urbdomo kaj ĉiujn aliajn aferojn li metis flanken, alportante hejmen el la oficejo ĉiun vesperon la planojn. Li montris ilin al mi, kaj mi rimarkis, ke ili estas preskaŭ finitaj. La loko, sur kiu oni intencis konstrui, estis deklivo, kies malalta fino troviĝis ĉe la angulo, kie kvin vojoj renkontiĝas. "Sur tiu malalta fino oni nepre konstruu la turon, ĉar tie ĝi vidigos en ĉiu vojo kaj helpos al la konturo," klarigis Arturo Benham.

Ni parolis pri liaj ŝancoj en la konkursa projekto, kiuj estos la jugantoj, ĉu estos multe da konkursantoj, k.t.p., dum li sidis ĉe la desegna tabulo uzante nigran inkon kaj de tempo al tempo ekbruligante pipon, kiu tuj estingiĝis, kiam li komencis labori.

"Se mi subite volas dormi, mi petas ne penu veki min, sed iru hejmen senceremonie," li diris, kaj mi rimarkis, ke li ŝajnigas, ke la afero tute ne estas grava.

"Do, ĉu vi estas tiel laca ?" mi demandis.

"Ne, mi ne sentas min tre laca, sed kiam venas la deziro dormi, tiam mi preskaŭ tuj dormas." Li ne donis pliajn klarigojn, kaj ni parolis pri aliaj aferoj.

Alian vesperon iom pli poste mi estis ĉe li, dum li laboris super siaj planoj. Ili progresis bone, kaj Arturo estis en gaja humoro.

"Kiam mi sukcese verkas, mi estas feliĉa," li diris.

"Jes, sed la deziro al verkado estas tirano, ĝi faras homon senpripensa pri siaj kunuloj kaj zorga pri si mem," mi diris.

"Zorga pri si mem ? Egoista ?" li demandis.

"Jes, por ke li havu bonan ilon por sia verkado, ĉu ne ?"

"Eble vi estas prava, kaj jen ebla klarigo, kial multaj geniuloj estas senpripensaj pri aliuloj," li konsentis.

"Kaj netolereblaj edzoj," mi aldonis.

Tiel ni filozofis sidante en lia ĉambro fumante pipojn.

Post kelka tempo li subite levigis dirante, ke li dormos. Li tuj kuŝis sur la sofo kaj profunde dormis.

Pro tio, ke li estis tiel vigla, mi tute ne komprendis, kial li subite dormis, en tiu strange senceremonia maniero. Mi lin vokis sed ne povis lin veki, kaj eĉ batetis lin sed tute senefike. Do, vole nevole mi devis foriri.

En la venonta vespero mi parolis al li pri lia stranga, profunda dormo.

"Ĉu la dormado ofte regas vin ?" mi diris.

"Jes, subite ĝi venas ĉiun vesperon, kaj tre malofte mi povas regi ĝin," li respondis.

"Ĉu vi vizitis kuraciston pri ĝi ?"

"Jes, sed li tute ne komprendas la kaŭzon kaj certigis, ke mi estas ja tre sana," li diris.

Nenion plu pri tio li diris, kaj iom poste mi forlasis lin. Tamen mi ne povis forgesi lian strangan profundan dormon. Sajnis al mi, ke eble li tro okupas sin pri la konkursa projekto kaj devus pli ekzerci sin korpe ; aliflanke li ja aspektas feliĉa kaj sana lastatempe.

Kiam mi denove vizitis lin, mi trovis, ke li havas ion nekutiman por konigi al mi. Li lasis la multajn paperajn foliojn sur la tablo, tiris brakseĝon al la kamena fajro, plenigis kaj ekbruligis pipon, kaj farigis same al mi.

"Mi havis tre vivecan songon dum la nokto," li komencis. "Mi songis, ke mi estis en domo de arĥitekturisto, kaj mi helpis al li en konkursa projekto. Kaj jen la loko difinita por la konstruota urbdomo estis tute simila al tiu, super kiu mi mem verkas. Mi vidis, ke ĝi estas la sama konkursa projekto, sekve li kaj mi estas samkonkursanoj. Kiel mi troviĝis en lia domo helpante al li pri la planoj, mi ne sciis. Mi vidis, ke lia desegno estas ja tre bona en ĉiuj rilatoj krom unu—li ne lokis la turon ĉe la fino de la konstruaĵo, kiel mi faris. Kaj kiam mi vidis tion, mi ne sciis kion fari, ĉar kvankam mi estis tie por helpi al li, tamen se mi lin helpus, mi malsukcesus en la konkursa projekto. Lia desegno estis pli bona ol la mia,

krom tiu parto pri la turo, kaj se estus tempo mi ŝangus miajn planojn konforme al la liaj. La fronto havis pli da ombroj, pli da pezaj detaloj ol la mia, tamen la turo lokita en malbona parto, kondamnos lian verkon; se oni ne sendos pli bonajn, mi mem sukcesos, mi ricevos la premion."

"Mi ne vidas ion rimarkindan en tiu simpla songo," mi diris.

"Ne, kompreneble, ĉar vi ne songis ĝin. Sed se vi povus nur travivi ĝin, kiel mi faris, vi certe pensus ĝin tre rimarkinda," li respondis. "Ekzistas du specoj de songoj: tia, kian oni songas en la frua parto de la dormo, kaj tia, kian oni songas tuj antaŭ ol vekiĝi. La unua estas pri realaj spertoj en la spirita mondo: la dua estas nur miksaĵo el la fizika cerbo, ofte senforma kaj tute absurdaj. La unua speco estas ofte treege bela kaj reala, kaj oni memoras ĝin tre bone tuj post vekiĝo, kiu ĝenerale okazas ĉirkaŭ la tria horo matene. Bedaŭrinde ĝi iom post iom fariĝas malpli klara, ĝis oni iom post iom tute forgesas ĝin."

"Do vi pensas, ke via songo estis realajo en la spirita mondo?" mi demandis.

"Ne, se ĝi estus nur tio, mi tute ne pensus ĝin pridirinda," li respondis. "Ĝi estas io pli."

"Kial?"

"Ĉar ju pli mi pensas pri ĝi, des pli da detaloj mi memoras," li respondis per iomete ekscitita mieno.

"Do kio ĝi estis?" mi demandis.

"Mi ne scias," respondis li.

Baldaŭ poste li falis en profundan dormon, kaj mi lasis lin sur la sofo, senbrue elirante el la domo.

Dum kelkaj tagoj mi estis okupata en la vesperoj kaj ne povis lin viziti. Tamen post eble kvin tagoj mi denove troviĝis en lia ĉambro, fumante kiel kutime. Post kelkaj salutaj vortoj mi trovis, ke li ree havas ion por diri.

"Ĉu vi denove songis?" mi demandis.

"Jes," li respondis, "mi songadis la saman songon ĉiun nokton. Mi estis en la sama ĉambro kun la samaj homoj, kaj ni verkis kaj laboris super la planoj kiuj nokton post nokto bone progresis. Kun ĉiu nokto la songo fariĝas pli reala."

"Do, vi eble bone lernis en viaj songoj?" mi demandis. "El viaj songoj vi ricevis bonajn ideojn por viaj planoj?"

"Ne, mi ne ŝangos miajn planojn nun; ili ja estas bonaj. Mi ne ricevas helpon el miaj songoj, nur unu turmentan personon, kiu ne lasas min ripozii."

Mi nun rimarkis, ke li ja ne aspektas tiel

sane kiel antaŭe. Li fariĝis pli pala kun nigraj linioj sub la okuloj, kaj entute ŝajnas maltrankvila.

"Kia estas la turmenta penso?" mi demandis.

"Mi pensas, ke mi devas helpi al la arĥitekturnisto de miaj songoj klarigante al li, kien li devas loki la turon. Antaŭ du tagoj mi decidis, ke se mi resonĝos la saman aferon, mi nepre helpos al li. Tamen, kiam mi songis, ke mi ree estas kun li, mi timas helpi al li laŭ mia taga decido, ĉar mi per tio malgajnos en la konkursa. En du noktoj mi malsukcessis helpi al li."

"Se mi estus sur via loko, mi ne helpus lin," mi diris.

"Jes, ja vi helpus. Li estas malriĉa, havas edzinon kaj tri infanojn. Bonuloj ili ĉiuj estas, kaj se vi nur konus ilin, vi farus multon por helpi al ili. Kiam mi estis ĉe li lastan nokton, mi vidis kiel longe li sidis super la tabulo kun klinita dorso. Kaj envenis lia edzino nerimarkata de li: ŝi longe rigardis al li kaj tiam alproksimiĝis kaj alkroĉigante al liaj brakoj, tiel ke li ne povis uzi sian krajonojn, petis ke li ne plu kurbiĝu super la tabulo. Tiam li klarigis al ŝi, ke li faras ĉion por ŝi kaj la infanoj: ke li ĝuas la verkon, ke post nur du-tri semajnoj li jam estos sukcesa en la konkursa kaj riĉa kaj povos sendi ŝin kun la infanoj sur la kamparon por bona libertempo."

"Kaj Vilhelmo kaj mi vizitos vin dum la semajnaj finoj, ĉu ne Vilhelmo?" li diris, turnante sin al mi. Kaj mi respondis "Jes, kaj ni alportos al vi Patrino, la longe deziritan hundidon, kaj al la infanoj iliajn plej amatajn ludilojn."

"Do, kiu estis vi en tiu familio?" mi demandis.

"Mi estis, aŭ pli ĝuste 'estas,' ĉar la songo vere ekzistas kiel realajo—mi estas la plej aĝa infano Vilhelmo," li klarigis.

"Kaj vi ne parolis al via songa patro pri la ĝusta pozicio por la turo de la Urbdomo?" mi demandis.

"Ne, mi ne faris; sed mi ja faros hodiaŭ nokte," li certigis.

Post kelka tempo mi lin forlasis, kaj iris hejmen pensante pri lia stranga songo. Mi unufojon legis, ke homo resonĝis kaj redaŭrigis la saman songon nokton post nokto vizitante saman lokon kaj renkontante samajn amikojn. Sed mi estis skeptika, ĉar en ci tiuj modernaj tagoj oni ja legas multe da malveroj. Tamen, jen venis al mia amiko tiu mirinda sperto.

Arturo Benham estis homo kun forta karaktero, multe leginta pri psikaj aferoj, bone konata kiel scienculo en diversaj Londonaj

asocioj. Li do tute ne lasadis, ke ia bagatelo maltrankviligu lin. Por la ordinara spiritisto, kiu ĉeestadas spiritismajn kunvenojn, li havis malestimon: tamen li ne neis, ke ja okazas ĉe tiuj kunvenoj strangaj fariĝoj, kiujn ne povas klarigi la sciencistoj. Arturo Benham ĉiam havis pri tiaj aferoj klarigojn, kiujn li nomis hipotezoj. "Kredu al miaj hipotezoj, se vi ne havas pli bonan klarigon," mi ofte aŭdis lin diri, kiam oni diskutis pri la okultismaj aferoj. Do kiam mi demandis al li pri lia songo, kaj li respondis, ke li ne scias kiaspeca ĝi estas, mi tre miris. Maltrankvila pri lia cerbosano mi ne estis, ĉar li estis unu en mil homoj per tio, ke li ĉiam restadis kvieta kaj pensipova sub la plej strangaj okultismaj fariĝoj. Do kvankam mi multe pensis pri lia stranga sperto, tamen mi ne pense turmentis min pri lia danĝero. Kun la tempo venos klarigo, mi pensis.

Post du vesperoj mi lin ree vizitis. Tiam mankis dek tagoj ĝis la tago; en kiu oni devis sendi la verkojn al la konkursaj jugantoj, kaj liaj planoj estis preskaŭ pretaj. Enirinte lian ĉambron mi trovis, ke li legas.

"Aŭskultu al ĉi tio," li diris legante la ĵenon: "Kiam la korpo profunde dormas, la spirito, senkatenita el la korpa zorgo, povas forlasi ĝin kaj labori en pli altaj mondoj. Tiam la spirito povas doni al siaj kunuloj altajn idealojn kaj bonajn ideojn multe pli bone, ol ĝi povas en sia fizika korpo, ĉar la fizika korpo estas nur masko. Kiam ni flanken metas niajn maskojn dum profunda dormo, tiam ni forigis unu el la baroj, kiu apartigas nin de la realo, kaj sekve ni povas vivi pli reale. Tamen, kiam ni vekiĝas al Tero, tre malofte ni povas memori, kion ni faris en la pli altaj mondoj." Li finis, kaj ferminte la libron rigardis al mi demande.

"Do vi pensas, ke via songo estas memoro pri via vivo en pli altaj mondoj?" mi demandis.

"Mi ja pensus, ke ĝi estas tia, se mi farus pli altajn agojn, sed ĉar mi ne agis tre noble en mia songo, mi pensas, ke ĝi ne estas tia," li respondis.

"Do, kio ĝi estas?"

"Mi ne scias, sed mi intencas trovi klarigon, kiu kontentigos min," li diris. "Mi havas kelkajn hipotezojn, unu el ili eble kontraŭstaros ĉiujn kritikojn. Ekzistas ekzemple, kelkaj specoj de telepatio: duobla personeco: fantomoj de vivantoj: memoro de pasinta Ter-vivo: la granda etera memoro de la naturo, kun kiu oni povas rilati, k.t.p., k.t.p."

"Sufiĉe!" mi ridis. "Ni revenu al via songo. Ĉu vi fine klarigis al via songa patro pri la loko por la turo de la urbdomo?"

"Jes, lastan nokton mi sukcese faris tion,"

li diris. "Unue li forte kontraŭstaris la ideon, sed pli poste kiam mi montris al li la diversajn kialojn, faris malgrandan skizon pri ĝi, kaj memorigis al li kelkajn konstruajojn en tia formo, li konsentis."

"Do, nun vi estas kontenta?"

"Jes, kvankam vi pensas, ke mi estas malsaga por atenti songon, tamen ĉar mi finis, kion mi volis en tiu songo, nun venis al mi paco, kiu antaŭe tute mankis al mi," li diris.

Mi vidis, ke kion li diris estas tute vera. Li ja aspektis pli trankvila, kaj lia okulo pli brila kaj ripoza. Kaj nun li komencis pridiri por mi multe da detaloj pri la vivado de siaj songoj parencoj. En malmultaj vortoj jen kion li diris. Ili loĝas ie en Londono, en malgranda domo, kaj ilia nomo estas James. Henriko estas la alia filo, havanta la agón de dek-du jaroj, kaj Marino kaj Julio estas du junaj filinoj, okjara kaj sesjara. Li ne konas la baptan nomon de la gepatroj, ĉar ili ĉiam nomis unu la alian per karulo aŭ karulino, kaj li ne povas memori al la adresitaj kovertoj, kion oni skribis: sed li estas certa, ke ilia nomo estas James. Li ĉe tiu songa familio kutime verkas super la tabulo dum la nokto, de la deka eble ĝis la kvara matene, poste li mangas, kaj promenas sur la stratoj ĝis bela parko. Li revenas ĉirkaŭ la sepa kaj enlitigas. Tio okazas same preskaŭ ĉiunokte nun, li finis.

"Tre stranga vivmaniero," mi diris.

"Tamen la songo estas tre viveca," li intermetis.

Dum la venontaj tri semajnoj mi atendis la rezulton de la konkursa. Mi vizitis lin du-tri fojojn ĉiusemajne kaj trovis, ke ju pli alproksimiĝis la tago, en kiu oni konigos la sukcesan konkursanton, des pli li konstruis la estontecon sur sia sukceso. Li ne estis eksitita kaj ne ofte parolis pri tio, sed mi povis rimarki el kelkaj vortoj, kiujn li lasis fali, ke li ja esperis ricevi la premion kaj la konstruigajn zorgojn. Foje mi demandis al li, kie li intencas libertempi en la sekventa jaro, kaj li respondis, ke eble li ne libertempos, ĉar li devos zorgi pri la konstruado de la nova urbdomo. Alifoje kiam mi eniris lian ĉambron, mi trovis gvidlibron pri Liverpool kušantan sur la tablo, kaj responde al miaj demandoj pri tio, li diris, ke eble li baldaŭ loĝos tie, ĉar la nova urbdomo kuſos ne malproksime.

Lia stranga kutimo de subita endormiĝo ne forlasis lin, sed farigis pli malbona, kaj mi demandis al li, ĉu ne estus bone viziti alian pli faman kuraciston. Sed li ne volis tion fari, ĉar, li diris, la kuracistoj ĝenerale ne helpas al la homo resanigi, ili nur eksperimentadas, kio estas bone provebla, se oni vizitas kelkajn en unu tago; jen unu volas kuraci vin laŭ unu

metodo, jen alia konsilas ion alian, kaj jen alia kuracas tute per kontraŭa maniero. Oni ne scias, kiom da homoj ili mortigis, ĉar kiam iu homo mortas, oni diras: "Tiu mortis malgraŭ la kuracisto." Se iu homo travivas malsanon dum la doktoro vizitas lin, tiam oni diras: "Tiu resaniĝis danke al la doktoro"; kaj se iu homo travivas malsanon sen vizito de kuracisto, tiam oni diras: "Se tiu vizitus la doktoron ĉe la komenco, lia malsano estus nur ekmalsaneto." En ĉiu okazo la kuracistoj ricevas laŭdon: sed oni forgesas, ke nenio pruviĝis. La tuta sistemo de kuracistoj nune estas malbona. Sub la socialista socio, la ŝtato pagus la kuracistojn por sanigi la homon: nuntempe se ĉiuj homoj estus sanaj, la kuracistoj ne enspezus kaj vole ne vole devus elpensi malsanojn.

"Kaj kiel oni kuracos en la estonteco?" mi tiam demandis.

"En la estonteco oni tre ofte unue kuracos la pensojn, ĉar multaj malsanoj ja en la komenco devenas de erara pensado," li respondis.

Pri lia ŝongō li ne multe diris tuj antaŭ la rezulto de la konkursko kongresoj. Li diris, ke ĉiun nokton li vivis en sia ŝonga hejmo, en sia ŝonga strato kaj parko, kiel li nomis ilin. Sed ĉar tiu vivo estis tre simila de nokto al nokto, li ne havis ion tre notindan por pridiri al mi. Tamen unu stranga ŝonga fariĝo mirigis min. Kiam venis la nokto post la tago por konkurse sendi la planojn, tiam li ŝongis, ke lia ŝonga patro jam ankaŭ sendis sian, kaj sekve ne estis laboro por li. Tiam li eliris sur la Londonaj stratoj kun multe da lumoj, kaj eĉ vizitis kinematografejon. De post tiu nokto, li diris, neniam li ŝongis, ke li verkis pri la konkursko.

Unu vesperon ni sidis babilante en lia ĉambro dum la suno malleviĝis en la okcidento. Estis bela aŭtuna vespero, tiu parto de la jaro, kia estas tiel paca.

"Mi konas la rezulton de la konkursko," li diris per tre trankvila tono.

"Ĉu vi sukcesis?" mi senpacience demandis.

"Ne," li respondis. "S-ro Donald James el Londono sukcesis."

"James?"

"Jes, kaj jen estas ilustraĵo de lia verko; ĝi estas tute same al tiu de mia ŝongo."

Ni rigardis unu al la alia dum kelka tempo, ne parolante. Fine mi demandis, ĉu li povas klarigi la aferon. Sed li nur skuis la kapon, kaj ni baldaŭ komencis diskuti pri aliaj aferoj, dum pli kaj pli mallumiĝis. Fine mi forlasis lin kun liaj libroj, kaj li ja ŝajnis sufice feliĉa sidanta ĉe la tablo en la lumo de la lampo.

(Daŭrigota).

## Estas Neeble Forgesi!...

De S-INO E. KIROV.

Malgranda, simple, sed komforte meblita ĉambro estas apenaŭ lumigata de finbrulanta kameno; ĝiaj belaj, delikataj radioj mildigas la grizan duonlumon, plenigantan la ĉambron de-post vesperiĝo. Apud fenestro, tra kiu apenaŭ penetras vintra krepusko, batalanta kontraŭ la lumo de strataj lanternoj kaj la blankeco de l' neĝo—en profunda apogseĝo, ĉe skribotablo sidas enpensiĝinte nejuna virino.

Ŝiaj okuloj, konservintaj ankoraŭ postesignojn de iama beleco, fiksas unu punkton, la brakoj kuſas senforde sur la genuoj, unu mano kunprenas leteron. Sur la genuoj, inter la faldoj de l' robo, sur la tapiŝo, en la duone eligita tirkesto de l' tablo—ĉie kuſas malnovaj leteroj.

Hodiaŭ la virino kun blankiĝintaj haroj malfermis la tablokeston, ekvidis paketojn de malnovaj leteroj, respeguligantaj ŝian tutan malfacilan vivon, ekvidis la konatan, karan skribmanieron, prenis unu el la leteroj—kaj ne kapablas plu sin forſiri de la rememoroj, ne kapablas reveni al la realeco. Ŝi tralegas unu leteron post alia, ŝi revidas bildojn de l' pasinto, ŝi vidas sin mem ne maljunulino kun blankaj haroj, sed gracia junia knabino kun luksa harligo kaj vivoplenaj nigraj okuloj...

...Bruplena, granda urbo—majesta konstruaĵo de universitato—koridoroj, plenaj je vigle moviĝanta gejunularo. Apud unu el la fenestroj staras junia studentino kaj fervore diskutas kun "maljuna" studento. — Ĉu estas eble studi medicinon kaj ne fidi ĝin?—sonas ŝia junia, emociplena voĉo—ĉu oni rajtas tiamaniere ĉion analizi? Ne! mi varme fidas mian inklinon! kiom da utilo mi alportos al malriĉuloj, kiom...

Malgranda ĉambreto estas apenaŭ lumigata de malmultekosta lampo; apud tablo sidas la edzo-studento legante; morgaŭ estos la lasta ekzameno.

Sur lito sidas la edzino kun infano sur la brakoj, pala, elturmentita...

Kie restis ŝia fido, ŝia energio? Unu sola penso, boranta la cerbon, neforigebla, ŝin plenigas: kie trovi monon, kiarimedie ŝisvivi la finon de l' ekzamenoj, kiam Nikoĉjo ricevos la promesitan oficon? Kion fari?...

Vivoplena fervojastacidomo.... Viglamovado, brujo, emociitaj, larmaj vizaĝoj.... Ankoraŭ du-tri minutoj—kaj tiu forto kun tri fajraj okuloj forportos centojn da edzoj kaj patroj tien, en fremdan, malproksiman landon, el kiu, eble, multaj ne revenos. Junia virino kun infano sur la brakoj adiaŭas sian tutkore amatan edzon.

Šiaj belaj okuloj estas plenaj je senlima malgojo kaj angoro.

Sonorilo. Lasta adiaŭo. La vagonaro ekmoviĝas. Impulso de freneza malespero igas ŝin postkuri la ruligantajn vagonojn. En la okuloj ia nebulo. Lastafoje malklare desegniĝis la kara figuro en uniformo de militkuracisto... Ĉio ekturjniĝis kaj malaperis... Si restis sola, sola... . . .

Du suferoplenaj jaroj de peza soleco... La tuta vivo kuncentriĝas en letero "el-tie"... Telegramo... "Mortigita"... Por kio vivi?... Sur la planko ludas ĉarmia trijarulineto... Estas necese vivi!... . . .

Bela, ora aŭtuno... Rava suna tago... Sur unu el la aleoj de l' urba parko ludas dekjara knabineto. Sur benko sidas ankoraŭ junu, sed pro malĝojo kaj malriĉeco maljuniĝinta virino. Ŝiaj belaj okuloj kun sapiro kaj amo rigardas la knabinon.

Kun granda agitigo ŝi aŭskultas sian kunkarolanton; malfacila, turmenta sentbatalo pentriĝas sur ŝia vizago. Li parolas al ŝi pri kvieta maljuneco, pri ripozo, pri komforto por ŝia filineto; li diras, ke estas ja necese vivi, estas bezone konservi la restantajn fortojn. Lia bonkora, simplanima mieno estas plena je kareso kaj simpatio... Kion fari? Si tiom pasie dezirus ĝui kvieton kaj animan pacon, tiom terura estas soleco... Si estas preta etendi al li sian manon—sed antaŭ la okuloj restariĝas vidaĵo, pro kiu frostiĝas la sango en la vejnoj.

Meze de amaso da kadavroj kuŝas tiu, al kiu ŝi estis fordoninta ĉion—li kuŝas kun vundita kapo kaj forſirita brako. Kiamaniere tion forgesi? Kiel vivi kviete kun tia teruro en la animo?

Jen—gi, la letero de lia kolego, priskribanta la tutan teruron kaj la suferojn de la amegata homo... Kaj ŝi forgesis... La vivo supervenis... La fortoj ne suficiis por ĝin kontraŭbatali... Sed alie ne estis ja eble...

Si savis ja sian knabineton... La kara etulineto grandigiĝis sana kaj feliĉa—ŝia junago estas venenigita de nenio, ĉio estas luma ĉirkaŭ ŝi. La duonpatro amas ŝin, kiel sian propran filinon. Ciuj envias tian maloftan familion. Kial do ŝiaj haroj tiom frue blankiĝis, kial tiom malofte ŝoja rideto lumigas ŝian vizagon? Kial?...

Hele ekflagris la fajro en la kameno kaj eklumigis por momento la ĉambron. La virino levis la kapon, kaj ŝiaj okuloj renkontis aliulajn okulojn. Sur la tablo staras portreto de la kara viro. Jen li en studenta uniformo, junu, belaspekta, amata... Ĉi tiuj klaraj, karaj okuloj rigardas rekte en la animon kaj diras: "Cu vi forgesos?... Estas neeble forgesi!... Neniam!..."

*El la rusa lingvo esperantigis,*

D-RO ANDREO FIŠER, L.K. (Tiflis).

## Kio estas la Lingvo de Pensado?

Kio estas lingvo? Ĝi estas kodo de sonoj kaj signoj. Por kio? Por la uzado de l' homaro, kiel ilo por la esprimo de la pensoj. Se ni deziras, ke aliaj komprenu niaj pensojn, ni devas esprimi ilin, uzante aŭ eldiritajn parolojn, aŭ skribitajn vortojn. Tiuj ĉi estas eroj en la kodo, en la lingvo kiun ni uzas. Sed antaŭ ol ni povas eldiri parolojn aŭ skribi vortojn, ni devas havi ideojn, kaj la ideoj nur venas de pensado.

Iu diras, "Mi scias tre bone pensi en la lingvo franca, aŭ en Esperanto." Alia diras, "Mi ne povas pensi, krom en la patra lingvo." Ĉu tiuj diroj estas veraj? Tio estas la demando!

Ni pripensu kelkajn minutojn pri la ago de pensado. Ni pensas, kaj se ni deziras pensigi alian pri tiu afero, ni devas transformigi la pensojn en parolojn. Ju pli oni kutimiĝas sin esprimi en ia lingvo, des pli rapida estas tiu transformigo. Sekve, kiam oni uzas la patran lingvon, en kiu oni jam de longe kutimiĝis esprimi la infanecajn pensojn, tiam la esprimo de la pensoj estas tiel rapida, ke ĝi estas tuja, kaj oni ne rimarkas la procedon: sed kiam oni uzas alian lingvon, malpli konatan, la procedo de la traduko, aŭ transformiĝo de la pensoj en parolojn, estas pli malfacila, pli malrapida, kaj klare rimarkebla. Ju malpli konata estas la lingvo, des malpli facile estas tiu esprimado de pensoj. Ekzistas homoj, kiuj scias paroli egale bone du aŭ pli da lingvoj. Tio signifas, ke pro multjara ekzerciĝado, ili povas esprimi la pensojn egale bone en ĉiu el la lingvoj konataj de ili. Sed ilia penso estas neŭtrala rilate al ĉiu, ilia penso estas sendependa de iu lingvo. Ekzemple se ili pensas pri tiu arbo kiu portas glanojn, ili ne pensas pri la vorto "kverko" nek pri "oak" nek pri "chêne"; ilia penso estas pri la objekto mem, pri tiu bela arbo kiu al ili donas tiom da ombro en la varmegaj tagoj de somero. Ofte okazas, eĉ en la patra lingvo, ke ni forgesas iun vorton, kvankam la ideo esprimota per tiu vorto estas al ni tute klara, kaj ni devas serĉi ĝin. Sed ĝi nur estas la koda sono, aŭ signo kiu mankas. Nature tiu afero okazas pli ofte en lingvo alia ol la patra.

Cu vi iam aŭdis paroladon de homo, kiu ne kutimiĝis paroli publike. Li balbutas, li sin esprimas malbone, kaj ofte li faras gravajn gramatikajn erarojn. Sed eble la ideoj kaj pensoj de tiu homo estas tute klaraj, kaj se li povus sidi kun plumo kaj papero, li povus esprimi siajn pensojn multe pli bone. Sed se tiu homo pensus en lingvo (tio estas en vortoj), liaj paroloj estus tiel klaraj, kiel liaj pensoj.

Petu al iu sur la kamparo, ke li diru al vi la vojon al iu loko de vi nekonata. Ĉu li ĉiam direktas vin klare? Kial ne? Ĉu li mem ne konas la vojon aŭ ĉu li pensas malklare pri tio? Ne! li tre bone konas la vojon, kaj povus trovi ĝin facile. Estas la ĝustaj paroloj kiuj mankas, ne la pensoj. Li scias pensi pri la vojo, sed ne scias eldiri la pensojn. Li pensas ne en paroloj, sed en pensoj.

Se la penso dependus de lingvo (t.e. sur paroloj aŭ vortoj), ni devus konfesi, ke surdmutulo ne havas kapablon pensi. Sed li scias bone pensi. Estas vere, ke li ne povas pensi tiel bone kiel nesurdmutulo, ĉar estas multaj pensoj, kiuj neniam povas veni al lia kapo, pro lia manko de aŭdpovo, sed li povas diferen-cigi klare inter ruĝo kaj verdo, inter ĉevalo kaj biciklo, inter terpomo kaj ovo, eĉ se li neniam povas lerni la nomojn de tiuj objektoj, ĉar la nomoj nur estas eroj en la kodo, pli malpli hazarde aŭ arbitre elektitaj de niaj prapattroj.

Rigardu la kreskantan inteligentecon de infano; antaŭ ol tiu lernis iun vorton, ĝi jam de longe komencis pensi. Ĝi konas la patrinon, ĝi rimarkas la ĉeeston de fremdulo. Tio ne estas instinkto, ĉar la infano ne faris tion en la unuaj tagoj. Do! tio estas la komenco de penso.

Ĉu vi iam estis kolereta, ĉar oni al vi demandis "Pri kio vi pensas?" Ofte vi ne povas respondi. La pensado estas tiel rapida, ke vi pensis pri multaj aferoj en unu mallonga momento; por respondi al tiu demando vi devas kvazaŭ kolekti la pensojn interrompitajn per la subita demando, kaj esprimi ilin per paroloj. Sed, se vi estus pensinta en lingvo, la paroloj estus tute pretaj.

Iu fama lernolibro (angla) pri la ŝakludo komenciĝas per la jenaj vortoj:—"Sako estas procedo de pensado." Ekzistas multaj ŝakludistoj, kiuj povas entrepreni la ludadon de partio, aŭ eĉ de kelkaj partioj samtempe, sen video de la ŝaktabulo. Ĉu ili pensas pri tio (kaj estas necese forte pensi) en ia lingvo?

Ne, neniu pensas en lingvo, la ŝakludisto pensas en ideoj, same kiel aliaj pensantoj, li pensas en ideoj, sed liaj ideoj estas pri strategio, dum ke la ideoj de muzikisto estas pri belaj melodioj kaj harmonioj.

Tiu, kiu multe pensas, nature deziras esprimi la pensojn, kaj ju pli oni esprimas la pensojn en kia ajn lingvo, des pli facile tio fariĝas, ĝis fine la transformigo de pensoj en vortojn estas tiel rapidega, ke ĝi estas kvazaŭ instinkta. La du procedoj, la pensado kaj la esprimado, fariĝas kvazaŭ unu, kiam fakte ili ĉiam restas du, kvankam multe kunligataj.

Do! la konkludo, al kiu ni venas, estas, ke la pensado estas tute sendependa de lingvo, kiu nur ekzistas kiel ilo por la ĝusta esprimo de la pensoj.

E. L. JACKSON.



### Bela Edziĝpropono!

*Al la Honorinda Konsilantaro por la Malriĉuloj de Urbo N.*

*Gesinjoroj,*—Dezirante ŝangi la malutilojn de la benita fraŭleco por la ĝojoj de la edza feliĉo, sed estante nature de tre modesta kaj nepostulema temperamento, mi estas pro tio malhelpata akiri kunulinon per la ordinara vojo de amindumeco, tial mi prenas la liberecon skribi al vi, *Gesinjoroj*, esperante, ke vi havas sub via gepatra zorgo, en via institucio, junan virinon, kiu deziras ŝangi la malhonoran influon de publika institucio por alpreni sian propran pozicion en la familia sfero.

Mi devas diri, ke mi estas terlaboristo kaj intelekte sana. Mi estas granda, dika, havas 27 jarojn, bonajn okulojn, nigrajn harojn kaj brunajn brovojn.

Mi razas min dufoje ĉiu semajne kaj surmetas kolumnon dimanĉe. Mi preferas junan virinon de ĉirkaŭ mia aĝo, aŭ iomete pli maljunan, ĉar mi ne volas junan petolemajon. Kvankam mi ne postulas kunulinon kun eksterordinara beleco, mi preferus unu, kies eksterajo almenaŭ ne estus okulvundilo por la najbaroj. Mi preferus unu kun kvieta, sed ne melankolia temperamento kaj mi ne postulas virinon kun muzikaj kaj literaturaj inklinoj. Virino, kiu interesas sin pri naturaj aferoj, povus sekvi sian inklinon laŭ fantazio je nia reciproka utilo, precipe dum la sezono de napok kaj terpomrikolto. Si devas havi spertojn pri unu porko, unu kato, 19 kokinoj, 8 anasinoj, unu kanario, kaj la blankigo de muroj.

Mi preferas virinon kiu povas kudri kaj fliki, kiu povas, se necese, forteni la mizeron de la pordo kaj lombardi miajn dimanĉ-vestaĵojn. Ĉar mia salajro ne estas tre granda, mi deziras virinon kun moderaj gustoj koncernante robojn kaj kun malgranda apetito. Se vi, *Gesinjoroj*, povas plenumi ĉi tiun mian modestan peton, mi, kun plej granda plezuro, oferos 5 jarojn de la vivo de mia landsinjoro.

Esperante favoran respondon, mi subskribas,

Sincere via,

TOM BACHELOR,

*Terkulturisto.*

*Trad.* FRANK O. ZOCHER.

## The British Esperanto Association (Inc.).

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

### CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

JAMES BURNET, M.A., M.D., Ch.B., M.R.C.P.E., 6, Glengyle-terrace, Edinburgh; CHAS VAN COMPERNOLLE 4, Cornwall-gardens, London, S.W.; D. W. M. JENKINS, Leinster House, Kingstown, co. Dublin.

### PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

\*JOSEPH CARLTON, T. R. BUTTERICK, F. H. PEACOCK, Hull.

### PASSED ADVANCED EXAMINATION.

Mrs. E. JACKSON, Kendal, Westmorland; Miss C. M. BROCK, East Melbourne, Mrs. S. TREWIN, Bayswater, Victoria, Wm. MACDONALD, Blackrock, Victoria, Australia; \*JAMES BURNET, M.A., M.D., Ch.B., M.R.C.P.E., Edinburgh; HERBERT SPACKMAN, Corsham, Wilts.

### NEW FELLOW.

MISS ANNIE DENT, Rawmarsh, nr. Rotherham.

\* Denotes that the candidate has passed with distinction.

The Examinations Committee begs to announce that on Monday, November 8, at the offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., will be held an Examination for the Preliminary Certificate, at 7 p.m., and on Tuesday, November 9, an Examination for the Advanced Certificate, at 6.30 p.m. Candidates should intimate as soon as possible their intention to be present.

## New Members for 1916.

The importance of increasing our Membership at this rather critical time will be apparent to everyone, and a special appeal is made to present MEMBERS to induce their friends to realise the importance of supporting such a Movement as ours. On referring to the FORM OF APPLICATION FOR MEMBERSHIP printed on p. iii. of cover, intending Members will see that there is no need to wait till the New Year, as Subscriptions received now will be accepted as from January 1, 1916.

ABONANTOJ! Petu prospekton ĉe la Sekretario kaj sciigu pri la utiloj de Membreco.

## Council and Executive Meetings.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, November 15, at the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., at 6.30 p.m., and the following meeting on Monday, December 20, at the same place and time.

A Meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.

### AGENDA.

Financial Statement.

Correspondence and other Business.

E. A. ALLSOP, Acting Secretary.

## Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni enpresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilinia enpresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri penceoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu enpresajon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

620. Harderwijk, Camp de (Holando).—S-ro Vanden Bergh, Jos. bro., Artie. de place, internulo, baraque 21, deziras korespondi kun gesamideanoj per poštarktoj aŭ literoj el ĉiuj landoj.

621. Gloucester (Anglujo).—S-ro W. Minchin, 15, Westgate-street, deziras korespondadi kun rusa farmaciisto aŭ komercisto.

622. London (Anglujo).—S-ro Graydon Hume, Guy's Hospital, London-bridge, S.E., deziras korespondi kun kuracistoj aŭ studentoj ĉiulande.

623. Leigh (Lancs.) Anglujo.—S-ro Wilfred Fairclough, 53, Railway-road, deziras korespondadi kun alilandaj samideanoj.

624. Hong Kong (Hinujo).—S-ro C. Hoi, sekretario de la Hong Kong Esperantista Asocio, deziras korespondantojn por la anoj de sia asocio, precipe el Anglujo.

625. Paiyagala, N. (Cejlono).—S-ro P. Don Paul, "Philanni," deziras interŝangi kolorajn vidajojn, poštmarkojn kaj memorajojn kun alilandanoj.

626. Palmer's Green (Londono) Anglujo.—S-ro A. E. Boyce, 39, Elmdale-road, deziras interŝangi ilustr. poštarktojn kun alilanduloj. Ĉiam respondos.

## Council Meeting, B.E.A.

Held at the Offices of the Association on Monday, October 18, 1915, at 6.30 p.m. Present: Messrs. J. Bredall, P. J. Cameron, B. Chatterton, C. A. Fairman, G. Mercer Hollis, B. E. Long, A. Morrow, Dr. John Pollen, Misses L. S. Grant, C. M. Holmes, E. O'Brien. In Attendance: Mr. E. A. Millidge and the Acting Secretary.

*Chairman.*—There being no Vice-President present, the Hon. Treasurer was elected to the chair, which he vacated in favour of Dr. Pollen after the reading of the Minutes.

*A Resignation.*—A summary of a long letter from Mrs. de Montoro, of Glasgow, was read, explaining that her reasons for resigning fellowship of the Association were based on objections to expressions used by officers of the B.E.A. with regard to the War and published in the journal, and to the omission of the "Kongresanoj" to send greetings to "samideanoj en malamikaj landoj." The Acting Secretary was instructed to reply that the letter from Mrs. de Montoro had been laid before the Council, and that they had received her resignation with regret.

*Prisoners of War in Austria.*—A letter was read from a former Fellow of the Association, now a prisoner of war in Austria, asking if fellow-Esperantists would send him parcels of provisions, as he was at the end of his resources and had no friends. It was decided to publish his appeal in the B.E., the appellant's name and address to be supplied by the Secretary on application.

*Dr. Pollen's Tour.*—Dr. Pollen gave an account of his recent tour in Ireland and Scotland, and described his successful lecture to the group in Belfast, and his having met many business men, on whom he impressed the importance of Esperanto in the present crisis.

He also described the opening of the Winter Session in Glasgow, at which he spoke.

The Chairman also reported the loss sustained by Mr. J. M. Warden in the death of his son-in-law, and it was resolved to inform Mr. Warden that his colleagues on the Council wished to place on record their regret at the death of Capt. Miller whilst on active duty in Scotland.



## B.E.A. Guarantors, 1915.

Amount brought forward (B.E., p. 184) .....	£5380
Sinton Douglas, Terenure, co. Dublin .....	10
	£5390

627. Nausori P.O. (Fiji).—S-ro Lionel C. Raymond kaj S-ino Raymond deziras korespondadi kun alilandaj samideanoj poštarkte aŭ letere.

628. Wuchow (Hinujo).—S-ro Kwan, c/o Standard Oil Co., of N.Y., Wuchow, West River, South China, deziras interŝangi poštarktojn kun Amerikaj Esperantistoj.

629. Teheran (Persujo).—S-ro Mehti M. Aliev, Banque d'escampte de Perse, deziras korespondadi kaj interŝangi ilustr. poštarktojn kun virinaj kapetoj de ĉiuj nacioj. Ĉiam respondas.

630. London, N.—S-ro C. Pollett, 7, Finsbury Park-road (ago 22), deziras korespondi Esperante, france, hispane, aŭ angle kun samideanoj de ĉiu lando poštarkte aŭ letere, ankaŭ volas konatiĝi kun Romkatolikaj samideanoj en Londono.

631. Teheran (Persujo).—S-ro Mirza-Seid-Abdolla-Khan, La Banque d'escampte de Perse, deziras korespondi pri historiaj, ekonomiaj kaj moraj temoj.

632. Teheran (Persujo).—S-ro Mamed-Khan-Mehmet, La Banque d'escampte de Perse, deziras korespondi pri komerc-financaj kaj ekonomiaj temoj.